

TREVOR STEELE

**AMO INTER
RUINOJ**

TREVOR STEELE

**AMO INTER
RUINOJ**



© 2011

FEL

AMO INTER RUINOJ

AMO INTER RUINOJ

Trevor Steele

AMO INTER RUINOJ

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo



n-ro 39 en la serio „Stafeto”

Tiu ĉi estas nekompleta ekzemplero de la romano. Ĝi rajtas esti distribuata laŭplaĉe.

Por Katja, David, kaj Bob

„Kio? Al Sovetunio? Travis, ĉu vi freneziĝis? Aŭ ĉu vi ankoraŭ imagas, ke tie vi trovos spurojn de la Nova Jerusalemo?”

„Wally, ne forgesu, ke ankaŭ mi legis la *Gulagojn* de Solĵenicin. Kaj mi legis pli pri tiuj gulagoj en tekstoj, pri kiuj vi neniam aŭdis – sed sufiĉe pri tio. Lenin kaj Stalin definitive mortigis ĉiajn esperojn, ke tie estiĝos humana nova civilizacio. Ne, mi simple volas submeti min al la vivkondiĉoj tie. Ni danku Gorbaĉov, ke nun tio eblas.”

„Amiko, viaj verdaj aspiroj falos nazen tie. La purkoraj ruĝaj kamaradoj malpurigas la ĉirkaŭan mondon eĉ pli ol niaj hienaj kapitalistoj.”

„Wally, komprenu, mi ne volas iri tien kiel pilgrimanto al iuspeca politika aŭ ekologia sanktejo. Sed mi enuas en Aŭstralio. Mi estas dudekokjara kaj neniam mi estis ekster nia lando. Mi volas sperti la vivon aliloke, kaj ne gravas al mi, ĉu la litoj estas malkomfortaj aŭ ne. Kaj vi devas konfesi, Sovetunio estas signifoplena parto de la mondo.”

Wally mallevis la okulojn, kaj tiam li ĵetis al Travis unu el siaj „ruzaj” rigardoj, al kiu aldonis la formo de lia intelektula aglonazo. „Junulo, mi suspektas, ke mi scias tre bone, kial vi volas dumtempe foriri. Aĥ jes, mi memoras la doloron ...”

Travis ne respondis. Kompreneble Wally, kiu ofte aktoris malafablan urson, tamen estis sentema homo. Jes, la klarigo estis unuvorta: Belinda. Ŝia foriro estis ankoraŭ sanganta vundo.

„Sed aŭskultu, junulo, vi devus iel enspezi tie. Mi ne povas sendi honorariojn al Sovetunio. La rusoj ankoraŭ ne scias, kio estas bankkonto.”

Travis ridetis. „Eble ili estas pli feliĉaj pro tiu nescio! Sed ne zorgu, Wally, mi vivtenos min per instruado de la imperia lingvo. Kaj mi tre volonte kontribuus artikolojn por *The Sentinel*.”

Wally ridetis duone moke, duone amuzite, „De nia moskva korespondanto Travis Siganoff ... Nu, luksaĵo por nia modesta sentinelo. Fakte, la ideo plaĉas al mi. Malgraŭ viaj iluzioj – aŭ eble pro ili – vi verkas

bonajn artikolojn, junulo. Se vi insistas esti masoĥisto kaj iri inter la krudajn kamaradojn, mi volonte publikigus viajn kontribuojn. Sed mi devus pagi la honorariojn en vian konton ĉi tie.”

„Dankon, vi betonvizaĝa maljuna anarĥiisto! Kaj nun mi lasos vin grumbli en paco.”

„Momenton, vi verdebeka knabeto! Kio pri via laboro instrui la anglan al aziaj enmigrintoj?”

„Mi jam anoncis al la ĉefo antaŭ monato, ke mi eksiĝas, almenaŭ provizore.”

„Hm,” gruntis Wally, „kiam vi revenos el la ĝoja paradizo de la proletaro, via posteno probable ne plu estos havebla. Nia ekonomio estas mizera, kaj la registaro volas ŝpari siajn groŝojn. Instruado al enmigrintoj ne estas ekspansia industrio, knabo, kaj post unu jaro tiu fako pli maldungos ol dungos.”

„Nu, se tiel estos, mi trovos ion alian.”

„Jes,” cedis Wally malafable, „vi trovos. Sed mi neniam komprenis, kial tiel brilkapa juna viro ne studis medicinon aŭ juron aŭ ion alian, kiu havigas riĉan bankkonton. Iomete da instruado kaj la mizeraj dolaroj, kiujn mi povas pagi al vi. Ĉu mankas al vi ambicio?”

„Wally, ne blagu! Vi donas belan ekzemplon – vi vivas de la mizeraj dolaroj, kiuj restas post pago de viaj fakturoj. Kaj kial? Ne mienaĉu, olda bastardo, vi estas idealisto kaj pretas fari tion, kion vi faras, ĉar vi kredas, ke nia monotona gazetaro bezonas alternativojn. Vi povus esti burokrato kaj bone enspezi, sed vi preferas resti malriĉa kiel preĝeja muso kaj fari laboron, kiu vere kontentigas. Mi ne havas eĉ viajn kialojn por ne riĉiĝi. Mi simple neniam sciis, kion mi volas studi, kaj mi dravis en instruadon. Kaj verki por via gazeteto, kie mi povas skribi kion ajn mi volas, tio donas al mi kontentiĝon.”

„Kaj vi povas vivi de tio? Aĉeti domon?”

„Sufiĉas.” Travis ne volis komenti, ke Belinda en sia biblioteko fakte enspezas pli ol li.

Wally kompliceme ridetis. Li incitis Travis al tiu deklaro. Jes, li kaj Travis estis du maloftuloj, kiuj vere ne zorgis pri mono. „Mi ŝatas vin, ĉar vi estas ekscentrulo, knabo.”

Travis redonis la rideton. „Hm, kaj vi estas tute normala civitano, ĉu?”

Travis ekstaris por eliri, sed ree turnis sin. „Unu detalo pri mia vizo amuzus ankaŭ vin. Mi ne diris al vi, sed mi petis la vizon en februaro. Mi atendis. Mi skribis al la soveta konsulejo en Kanbero. Nenio okazis. Mi atendadis. Monatoj pasis. Mi kontaktis homojn en Kievo, kie mi intencas loĝi. Unu el ili havis brilan ideon: mi petu vizon kiel instruisto ne de la angla lingvo, sed de *biznez-ingliš*. Kaj du semajnojn poste, tio estas hieraŭ, venis la vizo – en aŭgusto! Imagu, mi kiel *biznesman*! Mi neniam en la vivo posedis akcion aŭ parcelon, kaj nun mi instruu al rusoj pri la komerca vivo!”

Travis ridis, dum Wally ŝajnsevere skuis la kapon. „Vidu, vi eĉ perfidas viajn rigidajn principojn. Nu, bonŝancon ... Hej, momenton. Alia demando. Ĉu vi iras al tiu granda gulagejo pro via nomo? Siganoŭ. Evidente rusa. Ĉu vi serĉos viajn familiajn radikojn?”

„Ne. Neniam pensis pri tio. Mia stranga nomo. Oni rakontas, ke mia avo – lia nomo estis Ciganov – alvenis en Aŭstralio iam en la 20-aj jaroj. Neniu aŭstralia burokrato sciis skribi la nomon, do avĉjo ŝanĝis ĝin. Mi preferus la aŭtentan version, sed kion fari?”

„Nu, Ciganov ...” Wally luktis por imiti rusan intonacion, „bonŝancon. Mi antaŭguas ricevi viajn artikolojn. Ej momenton, vi diris, ke vi havas kontaktojn en Kievo. Kiel tio eblas?”

„Hm, pere de plumamiko tie mi konas kelkajn homojn ...”

Iom abrupte Travis eliris el la tro malgranda redaktejo de *The Sentinel*. Li trairis la mallarĝan koridoron kaj estis baldaŭ surstrate. Li turnis sin kaj vidis refoje, ke la tuta modesta domo urĝe bezonas farbadon. Sed Wally ne multe atentis tiajn detalojn, kaj cetere li probable ne havis sufiĉe da mono.

Wally Kennedy estis viro, kiun Travis grandparte komprenis kaj elkore ŝatis. Eble li estis anakronismulo inter la bruantaj aŭtoj kaj kamionoj

pretersagantaj laŭ la strato, direktataj de streĉmienaj homoj. Kien ili devis tiel rapide iri? Bone, ke ekzistis ankoraŭ homoj, kiaj Wally kaj la du aliaj, kiuj produktis la gazeton.

Travis rigardis lastan fojon tiun konstruaĵon kun la malnovstila ŝildo kun la nomo *The Sentinel*. La periodaĵo, li memoris, havas eldonkvanton de ne pli ol 3,000, kaj ekzistas ne nur pro abonoj sed parte pro mondonacoj de admirantoj de la deca homo, kiu transprenis de sia patro la entreprenon. Iam *The Sentinel* estis legata de multaj miloj, grandparte komunistoj, tiam, kiam la partio estis ja marĝena sed ne tute ignorebla parto de la politika pejzaĝo de la lando. Sed la skismo, kiam Moskvo kaj Pekino malamikiĝis kaj dissplitis la movadon en la tuta mondo, draste limigis la nombron da homoj pretaj aĉeti *The Sentinel*. Apogantoj de la ĉina linio nomis Tom Kennedy kaj liajn alianculojn marionetoj de la Kremlo.

Wally kiel juna viro dumtempe apogis sian patron kaj la Moskvo-fidelulojn, sed kiam la patro subite mortis en 1969, Wally mem seniluziiĝis – ne, li emfazis, pri la idealo de pli justa mondo, sed pri la monstraĵoj de la sistemoj, kiuj pretendis celi tiun idealon. Li kondamnis kaj la rusajn kaj la ĉinajn partiojn kiel naciismajn diktaturojn. Iom post iom Wally iĝis anarĥiisto, sed li faris el *The Sentinel* forumon por ĉiaj alternativaj ideoj. Li eĉ publikigis artikolon de scientologo, post korektado de la gramatiko kaj ortografio. Unu fojon li enmetis artikolon de interesa viro, kiu ĵuris, ke eksterteranoj forkaptis lin kaj poste resendis al la tero por transdoni instruojn al la homoj. Wally trovis, ke efektive estas multe da saĝo en tiuj „instruoj”. Wally grumblante akceptis presi kelkajn reklamojn, bone sciante, ke ili donas tiun etan profiton necesan por daŭrigi la taskon, kiun li amis sed pri kiu li ofte blasfemis. Sed la reklamoj devis akordi kun lia „disidenta” vidpunkto; raraj varoj en moderna kapitalisma socio.

^^^

Wally ja ĝuste supozis, ke la fiasko de liaj rilatoj kun Belinda estas la

baza motivo, ke Travis foriru el Aŭstralio. Sed eĉ al Wally Travis ne diris, ke li ne nur forfuĝas *de* malfeliĉo; li esperis, ke li fuĝas *al* nova ŝanco de feliĉo.

Travis glitigis sian dekstran manon en la poŝon de sia ĉemizo. Li elprenis la foton de Marina kaj ree rigardis ĝin kun sopiro, kaj samtempe li akute observis tiun sopirantan viron el ioma distanco.

Marina. Kion li sciis pri ŝi? Sur ĉiuj fotoj ŝi estis plaĉaspekta, kaj la foto de ŝi en bankostumo apud la maro en Soĉi montris belan virinan figuron. Travis bedaŭris, ke la aspekto de virino tiel gravas al li, kvankam li bone sciis, ke post iomete la diferenco inter bela kaj nebela eksteraĵo apenaŭ rolas. Nu jes, Belinda certe estis bela.

Belinda. Pensoj pri ŝi ne lasis lin en paco. Ne tiom la pensoj, kiom la bildo de tiu aminda vizaĝo kun la bluaj okuloj, tiuj belaj virinaj rondaĵoj. Ke ŝi povas preferi alian viron, kiun Travis juĝis neniel konkursanto, tio vere doloris.

Marŝante laŭ la trotuaro apud surdiga trafiko, Travis devis konfesi sian propran arogantecon. Senkonscie li vere kredis, ke spektantoj opinius, ke el ili du Belinda pli gajnas el la geedzeco ol li. En la gimnazio li estis la admirata unuulo de la klaso, ŝi nur linda mezkapablulino; li estis la ĉampiona atleto, ŝi maksimume blondhara ornamaĵo de teamo. Jes, en la lernejo li povintus gajni la koron de ĉiu knabino – almenaŭ tion asertis liaj kamaradoj – kaj pro tio ne klopodigis sin por altiri iun ajn. Ĉe la universitato la situacio estis simila; lin oni rigardis stelulo, kaj en prelegejoj kaj sur basketbalejoj. Sed la granda anonimeco de la universitato estis tia, ke li sin sentis soleca. Kiam li fine revidis Belinda ĉe iu studenta koncerto, estis al li kvazaŭ li revenus hejmen. Lia atento evidente ege plaĉis al ŝi, kaj baldaŭ ili estis konstanta paro. Geedziĝo ŝajnis natura paŝo. La ĉampiono nun havis sian konstantan admirantinon ĉe si, la soleco finiĝis.

Do kio misis? Li ne emis cedi tion, sed retrospekte li konfesis, ke li desaporis ŝin en amorado. Ŝia seksa apetito unue surprizis kaj poste iom konsternis lin. Li memoris momentojn, kiam li nepre volis ion legi aŭ skribi, sed ŝi volis amori. „Kara, ni ne povas resti tuttage en la lito!” li ŝercis, sed ŝia paŭtado devis averti lin, ke necesas ia kompromiso.

Kiam fine li ekvidis Grant, oficiron en uniformo, la viron, kiun Belinda preferis al li, Travis tuj konjektis: ŝvelmuskola armeano kiu, kiam li ne mortigis aliajn homojn, plej interesiĝas pri generado de novaj homoj.

Do tiu malekvilibro de ilia amora vivo sendube estis faktoro, sed ĉu ĝi klarigis, kial la afero tiel subite kaj amare finiĝis?

^^^

Ne! Travis diris al si, mi ne plu cerbumu pri tio! Li refoje rigardis sian plej ŝatatan foton de Marina.

Al Wally li nenion diris pri Marina, parte pro tio, ke ilia konatiĝo okazis per Esperanto. Nur unu fojon Travis menciis la internacian lingvon al Wally, kaj la maljunulo iom mokis pri „ankoraŭ alia iluzio”. Do ekde tiam Travis prisilentis sian uzon de la lingvo.

Fakte li lernis ĝin en sia unua universitata semestro. Li ne ĉeestis klasojn – li kredis, ke li ne havas sufiĉe da tempo – sed unu el liaj kamaradoj donis al li etan *Course of Esperanto*. Travis lernis la francan dum du jaroj kaj la germanan dum kvar en sia gimnazio kaj atingis tre bonajn rezultojn, sed konsciis, ke ankoraŭ li nur glitas sur la surfaco de tiuj lingvoj. Fascinis lin, ke Esperanto estas tiel simpla sed samtempe permesas esprimriĉon kaj kreadon de propraj vortoj. Li lernis ĝin rapide, rezervante duonhoron vespere al la lingvo. Unu fojon li ĉeestis kunvenon de la loka Esperanto-grupo, sed rapide konstatis, ke estas akra kverelo inter du „tendaroj” en la klubo. Li ne plu frekventis la klubon, sed decidis, ke estus bone korespondi kun neanglalingvuloj. Krome, li ĉeestis du kongresojn de Esperanto, kaj legis sufiĉe multe de la literaturo. Agrable surprizis lin, ke la originalaj verkoj estas foje de alta nivelo. Li tre aprezis la poemojn de Kalocsay, Auld, kaj Boulton, kaj ĝuis la romanojn de la ŝercemulo Schwartz, de Ribillard, kaj aparte de Litkovskij.

Belinda ne estis parto de lia vivo, kiam li ekuzis Esperanton, kaj ŝi montris nenian intereson, kiam li parolis pri ĝi al ŝi poste. Eble komuna intereso tia helpintus teni ilin kune?

Ne, forgesu Belinda, li diris al si.

Li korespondis kun diversaj kaj diversaĝaj homoj en Italio, Brazilo, Irano, kaj Norvegio, sed tuj, kiam li vidis foton de Marina kiel „korespondemulino” en organo de la Tutmonda Esperanto-Asocio, li sentis deziron skribi al ŝi. Ke tiu nova kontakto komenciĝis ĝuste tiam, kiam li eksuspektis, ke Belinda renkontiĝas kun alia viro, jam donis ian konsol-erotikan guston al la korespondado, kvankam komence la konsolo estis nur sporada kaj malforta.

Li tre bone memoris la momenton, kiam la erotiko iĝis grava. Ĝi venis mallonge post la foriro de Belinda. Dubante, ĉu li agas prudente, li malfermis sian koron kaj elverŝis sian doloron al la malproksima korespondantino. Ŝia respondo estis tiel sentema kaj delikata kaj bele esprimita, ke li tuj imagis transdoni sian erotikan deziron al tiu virino kun la penetraj brunaj okuloj kaj kisinda buŝo.

Nu, liaj pensoj lasu Belinda malantaŭe. Ek al Marina!

^^^

La tagon antaŭ la flugo Travis telefonis siajn gepatrojn kaj la tri gefratojn. Neniu el la kvinopo komprenis, kial li volas iri al tiu „fia imperio”, kiel s-ro Reagan ĝin nomis. Travis ne vere klopodis komprenigi al ili. Lia familio jam delonge estis periferia en lia vivo, kaj li ne sciis, ĉu li devas tion bedaŭri. Eble la sola maniero pliproksimiĝi al la gepatroj estus ree aktivi en ilia eklezio, kaj tiun prezon li ne pretis pagi. Lia fratino Grace iom ĝenate diris, „Travis, mi volonte havus vian cerbon, sed vi ne uzas ĝin. Kaj kiel vi enspezos en tiu lando?” La gefratoj firme koncentriĝis pri antaŭenigo de la propra kariero kaj edukado de siaj infanoj, kaj Travis trovis, ke mankas al ili komunaj temoj, kiam li provis konversacii kun Grace, Josh, kaj Sharon.

Li redonis la ŝlosilon de la nun forlasita apartamento al la maklera kompanio kaj pasigis sian lastan nokton en Aŭstralio en hotelo. Li dankis, kiam li glitis en dormon, sopirante al Marina, kaj jes ja li profunde dormis.

Li devos alfronti longan flugon, kaj li aŭdis rakontojn pri la neeblo dormi en aviadilo.

^^^

La flugo per *Qantas* al Singapuro estis tute glata. La flughaveno sur tiu insulo estis tre moderna sed samtempe kvieta, kun milda plaŭdado de akvofontanoj. Mallonge Travis estis ekster la domo kaj tuj ekŝvitis. Nu jes, li memorigis sin, ni estas ĉe la ekvatoro, eterne varmega loko. Sed interne estis tre komforte, kaj li pasigis kelkajn horojn legante kaj marŝante.

Oni anoncis, ke pasaĝeroj por Moskvo sin pretigu por eniri la *Aeroflot*-maŝinon. Travis pacience staris kaj lasis la centojn da aliaj pasaĝeroj iri antaŭ li. Li miris, ke tre multaj el ili portas diversajn elektrajn aparatojn. Kiel ili povus preni tiajn objektojn en la kajuton de la aviadilo?

Viro staranta apud li rimarkis la ĉuajn rigardojn de Travis. „Ĉu vi estas anglo?” la viro demandis, kaj Travis supozis, ke lia akĉento estas rusa.

„Ne, aŭstraliano.”

„Aŭskultu min, ne gravas, mi povas paroli angle kun vi.” Nur tiam Travis ekflaris la odoron de alkoholo, kaj li vidis, ke la viro eĉ iom ŝanceliĝas, kiam ili iras antaŭen.

„Mia nomo estas Miŝa. Kaj via?”

„E ... mia estas Travis.”

„Bone, Trevis. Vi iras al Moskvo, ĉu? Kaj poste okcidenta Eŭropo?”

„Ne. Poste al Kievo.”

„Kaj poste?”

Travis rigardis la iom dikajn trajtojn de Miŝa kaj ne povis eviti rapidan karakteranalizon. Miŝa estis inteligentulo, sed probable ne feliĉa. „Mi ne scias. Mi laboros en Kievo.”

„Aŭskultu min, mi komprenas. Kompanio sendas vin, ĉu? Kaj vi loĝos en plej bona hotelo de Kievo?”

„Ne, mi iras proprainiciate. Mi volas loĝi kiel normala civitano de Sovetunio.”

„Ĉu vi estas komputilisto?”

„Ne, instruisto.”

Miŝa amare ridis. „Aŭskultu min, vi estas kuraĝulo ... aŭ eble stultulo, Trevis.”

„Dankon. Nek nek, mi kredas.”

„Kaj vi volas scii, kial tiuj rusoj ŝtopos la pasaĝeran kajuton per harsekigiloj kaj bolkruĉoj kaj hejtiloj kaj tiel plu?”

„Nu jes, tio surprizas min.”

Miŝa amare ridis. „Ha ha! Aŭskultu min, post unu tago en nia glora Sovetunio vi bone komprenos!”

„Do, la aferoj ne bone statas, ĉu?”

Miŝa mallaŭtigis sian voĉon kaj kvazaŭ sekreta agente flustris, „Stultuloj ankaŭ ili! Estas nova industrio en nia lando. Aŭskultu min, speciala branĉo de mafianoj.”

„Pardonu, Miŝa,” Travis moviĝis flanken por ne devi enspiri la buŝgason, „mi ne komprenas.”

Ĝuste tiam multaj homoj marŝis antaŭen, kaj Travis kaj lia konversacipartnero devis kunmarŝi. Sed tuj, kiam ili haltis kaj atendis, ke la unuaj grimpu sur la ŝtuparon, Miŝa daŭrigis sian konfidadon. „Jes, mi diris, mafio. Aŭskultu min, se tiuj,” – li gestis al homoj portantaj aparatojn – „montras aparte multekostajn aĵojn al doganistoj en Moskvo, tiuj doganistaj kamaradoj notas iliajn adresojn, kaj kelkajn tagojn poste mafianoj iros al tiuj adresoj kaj malbalastigos la homojn.”

Travis ne povis ne fiksrigardi Miŝa. „Vi volas diri, ke la doganistoj kunlaboras kun la mafianoj ..?”

Ree Miŝa amare ridis, mallaŭte. „Aŭskultu min, atendas vin iuj surprizoj en nia lando, Trevis! La salajro de doganisto estas malalta, sed estas manieroj pligrandigi la enspezojn.”

Travis ne havis tempon por respondi. Iu belaspekta blonda stevardino – lia unua penso estis, ke ŝi tre similas Belinda – subite alkriaĉis kelkajn pasaĝerojn, kiuj reagis same laŭtavoĉe. Travis komprenis neniun vorton, sed la malafableco inter la kverelantoj estis alarma. Li provis imagi tian scenon inter stevardino de *Qantas* kaj pasaĝeroj; ŝi estus tuj maldungita.

Malrapide, ĉar la multnombraj aparatoj devis ie troviĝi en la kajuto, la linio iris antaŭen. Travis demandis, kiun sidlokon Miŝa havas, kaj sekrete kontentis, ke la ruso sidos plurajn vicojn for de li. Alkoholon li foje ĝuis, sed ne la odoron el ies buŝo. Kaj lin jam ĝenis la ripetata ordono, ke li „aŭskultu” Miŝa.

Fine la pasaĝeroj ĉiuj sidis. La kverelado ne tute ĉesis. Evidente la du aliaj stevardinoj alianciĝis kun la kolegino, kaj pasaĝeroj apogis pasaĝerojn, sed almenaŭ la voĉoj estis malpli laŭtaj kaj agresemaj.

Travis rimarkis, ke post mallonga tempo Miŝa jam ronkas. La homo tute ne fieris pri sia Sovetunio. Aŭ ĉu li estis amara pro seniluziigita amo al ĝi? Ĉu multaj sovetianoj simile sentis? Kial tiom da rusoj enaviadiliĝis en Singapuro? Ĉu estis ia sovetia bazo tie?

Post longa atendado la aviadilo deterigiĝis. Kiam la insulo malaperis sub ili kaj la trajektorio de la flugo estis preskaŭ horizontala, la stevardinoj ekstaris montri la kutiman sekurec-rutinojn, sed ŝajnis al Travis, ke neniuj pasaĝero rigardas aŭ aŭskultas ilin. Pluraj konversacioj daŭris senĉese dum la prezentaĵo, kaj la stevardinoj ne ĝuis la farson. Kiel eble plej rapide post la senfrukta aktorado ili demetis la savjakojn kaj iris en sian propran kajuton.

Travis prenis la foton de Marina el sia brustpoŝo. Post ne pli ol tuta tago li rigardos la virinon el osto kaj karno, ne la surpaperan. Kion ili diros komence?

Li sukcesis telefoni ŝin antaŭ tri tagoj. Ŝi parolis Esperanton same bone, kiel ŝi ĝin skribis. Do flua konversacio eblos. Li suspektis, ke ŝi parolas pli lerte ol li, ĉar ŝi de tempo al tempo skribis pri Esperantotendumejoj por junuloj el la tuta vasta Sovetunio. Ĝis tiam Travis parolis la lingvon, krom ĉe la kongresoj, nur kun Jim Spencer, alia studento, kaj ili ambaŭ sentis la neceson pli ofte ekzerci. Legi tiel simplan lingvon prezentis nenian problemon, sed eĉ la plej facila lingvo en sia parola formo povas esti nur serio da nekompreneblaĵoj.

Nu, li kaj Marina tre facile interkorespondis pri multaj temoj. Certe ili kapablos ankaŭ paroli.

^^^

„Kara Virve, mi tre bedaŭras, ke mi ne povas regali vin per franca aŭ eĉ germana kuko!”

„Pascal, ni kontentas, kiam ni trovas ion ajn por manĝi en kafejo. Oni manĝas bone nur hejme aŭ ĉe restoracio de Inturist, kie necesas pagi per okcidenta valuto.”

„Kiam ges-roj Lakjusaar diris al mi, ke vi estas ĉarma ĉiĉerono, mi ne atendis, ke la promeno kun vi estos tiel unike agrabla, kaj ke vi estas senkonkurse la belecreĝino de Esperanto.”

Virve jam spertis, ke Pascal entuziasmas kaj emas tre rapide uzi superlativojn. Nu, eble ĉarma franca kutimo. Kaj iom da flatado ne doloras, sed ŝi ne volis reagi al tiel evidenta vira adorado.

„Dankon. Kalju kaj Heli Lakjusaar estas la solidaj kolonoj de la movado en nia urbo. Bonaj homoj. Kaj ĉiukaze, mi esperas, ke Talino plaĉas al vi.”

„Mi *amas* vian urbon! Tiel ĉarme mezepoka en kelkaj lokoj! Kompreneble mi preferus, ke estu ankaŭ bonaj kafejoj!”

Virve mallonge ridis. Pascal supozis, ke lia franca intonacio estas la motivo. Ne malofte alilandaj esperantistoj ridetis pri lia parolmaniero, sed ĉiuj rapidis aldoni, ke ili tre bone lin komprenas. Do li mem ridetis kaj demandis, emfazante la lastan silabon de ĉiu vorto, „Ŝu vi min

komprenás, fraŭlinó?”

Verve kvitancis tion per la atendita ridado, kaj li tre volonte rigardis ŝiajn belformajn dentojn.

„Almenaŭ la kafo estas trinkebla, ĉu ne?”

„Trinkebla sed ne trinkinda ... tiun frazon de mia pedanta maljuna instruisto mi neniam forgesos,” respondis Virve.

„Nu, mi zorge elektu miajn vortojn. Mi sidis kontraŭ gramatikistino!” Pascal rolis kiel hontanta lerneĵano, kaj Virve refoje devis ridi.

„Serioze, Virve, alia demando: morgaŭ mi pluvojaĝos al Tartu. Ĉu vi bonvolus akompani povran francan senlingvulon tien?”

„Aĥ, via franca galanteco preskaŭ persvadas min. Bedaŭrinde mi estos kun grupo da rusoj el Siberio. Gravaj partianoj. Ankaŭ ili estas senlingvuloj en Estonio, kvankam partoj de Talino kaj kelkaj urboj estas preskaŭ pure ruslingvaj. Kiam mi ĉiĉeronas por esperantistoj, mi faras tion senpage, sed rusoj pagas ... Ho pardonu, mi ne volas, ke tio sonu insulte! La plezuro de via kompanio estas en si mem pago, Pascal!”

„Mi mortos pro melankolio sen mia karega Virve Sed nu, mi tre ŝatus, ke nun vi rakontu ne pri la historio kaj arĥitekturo de Talino, sed pri la rava junulino Virve Hirsik. S-ro Lakjusaar diris, ke via familio estas interesa en si mem, kaj via vivo foje estis tre malfacila.”

Virve paŭzis. Kutime ŝi ne emis paroli pri sia vivo, sed Pascal estis simpatiulo kaj ankaŭ homo de malproksime, kiun ŝi probable neniam plu vidos. Do eble tamen ŝi rivelu al li kelkajn aferojn, kaj povas esti, ke rakontante ŝi pli bone sin komprenos.

„Pascal, ni ĉi tie ofte ne havas privatan vivon aparte de la grandaj politikaj eventoj. Iu diris, ke estas malbena vivo en ‘interesa’ epoko. Ĉiu familio en Estonio perdis anojn pro la militoj aŭ la deportoj. Multaj volas forgesi la pasintaĵon. Sed ankaŭ la nuntempo ne estas aparte gaja. Do mia rakonto estas serio da mizeroj kaj relative normalaj tempoj.”

„Vi estas eĉ pli bela, kiam viaj okuloj alprenas tiun tristan aspekton,

Virve ... Nu pardonu, mi ne fuŝos vian rakonton. Bonvolu daŭrigi.”

„Mi naskiĝis filino de heroino. Tia rolo ne estas facila.”

Pascal konstatis, ke nun Virve parolas nur parte al li, parte al iuj nevideblaj aŭskultantoj. „S-ro Lakjusaar menciis, ke vi estas filino de Lagle Hirsik. Eĉ en Francio oni aŭdis iomete pri ŝi.”

„Fakte, la historio de mia familio, kiel mi ĝin konas, komenciĝis en 1939, kiam Stalin invadis Estonion. NKVD-agentoj mortpafis mian avon kiel ‘kosmopoliton’. Li estis filozofo ĉe la universitato en Pärnu. Mia avino estis arthistoriistino ĉe la muzeo tie. Ĉia historiisto, kia ajn estu lia kampo, devis esti malamiko de ortodoksa stalinismo. Do Avinjo estis deportita al Siberio, kaj mia Panjo Lagle naskiĝis tie. Avinjo mortis en 1953, iomete antaŭ la morto de la Monstro mem.”

„Aj, kia sorto! Se ŝi estus vivinta kelkajn jarojn plu ...”

„Mia Panjo rajtis reveni al Estonio en 1957, kiam Ĥruŝĉov liberigis multajn gulaganojn kaj rehabilitis multajn viktimojn.”

„Jes, post Stalin Ĥruŝĉov estis kvazaŭ anĝelo!”

„Ne troigu liajn meritojn, Pascal. Li bezonis alianculojn kontraŭ la stalinistoj en la politburoo, kaj lia kampanjo kontraŭ Stalin estis fakte kampanjo por li mem. Memoru kion li faris en Hungario.”

„Oho! Mi aŭskultas kaj lernas!” Sed ĉi-foje Virve nek ridis nek ridetis.

„Nu, ĉiukaze mia Panjo ekvivis en Talino kaj sekrete aliĝis al grupo, kiu luktis por vivteni la estonajn lingvon kaj kulturon.”

„Kiel oni povas sekrete vivteni aferojn, kies esenco estas komuna publika uzado?”

„Bona demando, kaj mi ne scias respondon. Sed la grupo ne longe daŭris. KGB – intertempe Ĥruŝĉov rebaptis la malnovan NKVD de Stalin sed ne vere ŝanĝis ĝiajn ecojn – penetris la grupon kaj perforte disigis ĝin. Bonŝance por nia familio, la agentoj rigardis mian patrinon negrava anino, kaj ili nur minacis sendi ŝin al Siberio, se ŝi ne konformiĝos. La

fondintoj de la grupo estis aŭ mortpafitaj aŭ senditaj dum longa periodo al orienta Siberio.”

„Hm,” suspiris Pascal, „ni homoj en Okcidento ne scias, kiel bonŝancaj ni estas ...”

„Mia Panjo tiutempe decidis, ke estas senespere batali kontraŭ la sovetia sistemo. Ŝi studis por iĝi bibliotekistino, edziniĝis, kaj mi naskiĝis en 1966.”

Virve trinkis kelkajn gutojn da kafo kaj silentis. Pascal volis aŭskulti pli.

„Aĥ, vi ne menciis vian patron ĝis nun ...”

„Mia patro malmulte rolis en mia vivo. Vidu, Panjo estas virino kun feraj konvinkiĝoj kaj tre kuraĝa. Sed kunvivi kun ŝi ne estas facile.”

„Mi komprenas. Do ili disiĝis?”

„Jes, kaj li trovis malpli rezolutan edzinon, iun, kiu simple volis ami. Sed intertempe la granda politiko ŝanĝiĝis. En la jaro 1977 Sovetunio subskribis la Interkonsenton de Helsinko pri Homaj Rajtoj. Mia patrino reaktiviĝis politike, kaj komencis helpi registri paŝojn de Sovetunio kontraŭ la Interkonsento. Kaj tre sukcese. Ŝi povis transdoni multajn informojn al vizitanta angla ĵurnalisto.”

„Certe kuraĝa virino. Kaj la sekvo?”

„La sekvo estis, ke KGB sendis ŝin ree al Siberio. En 1978. Kompreneble ŝi kulpis pri ‘kontraŭsovetiaj agado kaj agitado’. Avinjo estis kondamnita per la samaj vortoj. Juristoj ne montris grandan imagopovon en tiu tempo.”

„Momenton. Panjo sendita al Siberio, kaj Virve ..?”

Longe Virve silentis, komunikante kun nevideblaj aŭskultantoj. Tiam ŝi glutis kelkajn gutojn da kafo kaj daŭrigis: „Virve estis sendita en orfejon. Mia patro ne volis havi min. Eble li kredis, ke mia ekzisto komplikus lian vivon kun la dua edzino. Mi estis dekunujara kaj jam bone parolis estone,

sed en la orfejo ni devis paroli nur ruse. Br, mi ne volonte memoras mian tempon tie, ĝi estis malvarmejo. Niaj gardistoj en la orfejo rigardis nin kanajlaro – grandparte ni estis idoj de malamikoj de la popolo, krimuloj de la plej aĉa speco, ‘siberianoj’. Kompreneble ni havis nenian kontakton kun tiuj ‘krimuloj’ frostantaj en Siberio. Probable multaj el niaj gepatroj mortis tie.”

„Kruele! Sed nun, mi supozas, vi parolas tute bone estone?”

„En la orfejo mi sekrete helpis kelkajn plijunajn ne forgesi la estonan – kompreneble frustrante en kaŝanguloj. Tio helpis min mem ne forgesi. Mi estis ribelulineto – eble estas iom de mia Panjo en mia karaktero. Kaj nun Panjo ne permesus, ke mi parolu ruse en la hejmo.

„Sed reen al mia Panjo. Ŝi estis en la gulago Mordva, koncentrejo por virinoj. Manĝaĵoj malmultaj kaj malbonaj. Oftaj punoj en izola ĉelo, foje dum semajnoj. Paroli lingvon alian ol la rusan punate. Kaj neniam perspektivo pri liberiĝo. Nur meze malbona sovetia gulago, kiel Panjo lakone diris.”

„Do kio okazis? Ŝi estas nun libera, ĉu ne?”

„Jes, viro nomata Gorbaĉov transprenis kaj volis, ke la KP restu reganta sed estu populara. Li enkondukis *glasnostj* kaj *perestrojka*. Kiaj estis liaj motivoj, pri tio disputu la historiistoj, sed li probable savis la vivon de mia patrino kaj dekmiloj da aliaj homoj. Li permesis al preskaŭ ĉiuj gulaganoj iri hejmen. Li permesis, ke la homoj diru kaj skribu, kion ili volas.”

„Jes, ni en okcidentaj landoj amas Gorbaĉov. Li metis finon al tiu Malvarma Milito. Li malfortigis KGB. Li estas la plej bona ŝtatestro de la mondo.”

„Unue mia patrino same entuziasmis pri Gorbaĉov kiel vi, Pascal. Sed la entuziasmo malvarmiĝis, kiam Panjo ree agis politike. Ŝi kampanjis por nuligo de la Kontrakto de Molotov kaj Ribbentrop, kiu transdonis la baltajn landojn al Sovetunio. Samtempe ŝi volis helpi starigi monumenton al la viktimoj de Stalin.”

„Via patrino estas interesa homo. Ĉu same bela kiel vi?”

La demando de Pascal estis mallerta kaj li tuj hontis pri sia plumpeco. Bonŝance Virve ne atentis ĝin, sed daŭrigis, „Ial Gorbaĉov rifuzis aŭskulti tiajn ideojn. Sendube li estas sub enorma premado de la dekstra alo de la partio. Lia sinteno al la baltaj landoj estas same senceda, kiel tiu de la iama fosilio Breĵnev. Cetere, vi trovos, Pascal, ke Gorbaĉov estas nun same malpopulara en Sovetunio, kiel li estas populara en via lando. Li ne plu sukcesas, oni diras, stiri vojon inter la progresemoj kaj la dinosaŭroj. Kaj pro tio li mem estas malforta. Neniu respektas malfortan politikiston ĉi tie.”

„Ĉu vere? Ĝis nun mi parolis nur kun esperantistoj ĉi tie, kaj mi ne demandis pri politiko. Kaj nun, se mi rajtas, pli pri Virve Hirsik. Vi estis en orfejo. Ĝis ..?”

„Ĝis panjo revenis el Siberio en 1985. Pri tiu tempo mi ne volas paroli, Pascal.”

„Kompreneble, mia ĉiĉerona anĝelino! Mi ne plu demandos pri tio. Sed nun? Vi vivas kun via patrino, ĉu ne? Kaj vi studis?”

„Eĉ en la orfejo, tion mi devas cedi, la lecionoj estis ne malbonaj. Ili instruis al ni bone skribi kaj paroli ruse. En 1985, deksepjara, mi rajtis ekloĝi kun mia patrino kaj studi lingvojn ĉe Inturist-lernejo kaj poste vivteni min per ĉiĉeronado. Mi povas paroli estone, finne, ruse, kaj pole.”

„Kaj esperante!”

„Jes, foje mi forgesas mencii mian plej ŝatatan lingvon. Eble pro tio, ke mi ne enspezas per ĝi.”

Pascal rigardis sian horloĝon. „Mi ege bedaŭras, sed s-ino Lakjusaar ordonis al mi reveni je la 6-a, ke ni vespermanĝu.”

„Se ili regalos vin, Pascal, tio signifas, ke dum multaj tagoj ili mem manĝis tre ŝpareme.”

„Do mi montru indan dankemon. Virve, ĉu vere vi ne povas veni al Tartu?”

„Dankon,” Virve ridetis, „sed mi ne povas.”

„Ĉu ni povos almenaŭ korespondi poŝtkarte? Vidu, jen mia adreso.” Pascal transdonis vizitkarton, kiu perfidis, ke li estas reprezentanto de vinkomerca kompanio.”

Virve paŭzis, sed decidis cedi almenaŭ tion. Pascal estis afabla juna viro, iom tro flatema eble, sed tio povus esti nacia trajto, kaj ne malagrable.

„Dankon. Jes, mi sendos al vi poŝtkarton, sed mi estas pigra korespondantino. Ne atendu tro, Mi petas.”

Ŝia bela rideto iom konsolis Pascal.

^^^

La du fintrinkis kaj Virve akompanis Pascal ĝis la apartamento de ges-roj Lakjusaar. Lia lasta rigardo estis fakte okula almozpeto, ke ŝi tamen iru kun li al Tartu. Ŝi ridetis kaj petis lin saluti en ŝia nomo Kalju kaj Heli Lakjusaar.

Irante al la apartamento de la patrino, Virve subite ekkonsciis, ke ŝi vere sentas sin pli libera ol antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi memoris la viziton de la finnoj, kiujn ŝi akompanis al Moskvo kaj Novgorodo. Anita, plaĉaspekta junulino samaĝa kiel Virve, ŝajne duone enamiĝis al la ĉiĉeronino kaj poste sendis al ŝi belan donacon el Helsinko. Ne konante la hejman adreson de Virve, la knabino sendis la pakon al ŝi ĉe la Inturist-oficejo. La postan tagon Virve ricevis imperativan leteron, ke ŝi tuj sin prezentu ĉe la KGB-ĉefsidejo. Tie oni pridemandis ŝin dum du horoj, kaj minacis, ke se io simila okazos, ŝi perdos sian postenon kaj estos punata ankaŭ alimaniere.

Ha, tiuj samaj KGB-anoj ne aŭdacus ŝin tiel trakti nun! Nun, dank' al ses jaroj da *glasnostj*, KGB trovis necese varbi pri publika „komprenemo”. Kia teatraĵo, ke *Pravda* antaŭ nelonge publikigis invitojn al la publiko viziti la ĉefsidejon de KGB kaj mem konstati, ke nenie troveblas la torturkeloj, pri kiuj „malicaj mensoguloj” babiladas.

^^^

„Panjo, ĉu vi planas novan agadon? Mi konas tiun mienon ...” diris Virve, iom konsternite. Lagle ne hezitus kuri kapantaŭe kontraŭ muro, kaj Virve tre esperis, ke ĉi-foje ne temos pri alia leĝe punenda agado.

„Jes, ĉi-vespere venos kelkaj geamikoj. Mi dankus, se ankaŭ vi ĉeestus, knabino.”

„Do bonvolu klarigi, pri kio temas.”

Lagle gestis, ke Virve eksidu. Ŝia filino rigardis kun amemo kaj zorgemo la fortan vizaĝon kun profundaj sulkoj. Jes, certe ŝia patrino estis iam bela, sed la jaroj da punado faris la mienon pli rezoluta ol altira.

„Ni volas havi aŭtentan balotadon en Estonio jam ĉi-jare.”

Virve levis la voĉon. „Kio? Panjo, ni jam voĉdonis, kaj kontraŭkomunisma partio elektiĝis! La politiko de Gorbaĉov estas por li detrua bumerango – ĉie, kie li permesas veran elekton, oni elektas kontraŭkomunistojn! Vi devus ĝoji pri tio.”

„Aŭskultu, mia filino. Tiu registaro de Edgar Saavisaar estis elektita ne nur de estonoj, sed ankaŭ de rusoj. Tio ne estas akceptebla.”

„Sed, Panjo, ni devas kunvivi kun la triono de nia loĝantaro, kiu estas rusdevena. Kial la rusoj ne rajtu voĉdoni?”

„Kiam vi fine komprenos, infano, ke ni estonoj devas savi nian identecon? Pro tio mi batalis dum la tuta vivo kaj batalos ĝismorte! La rusoj havas sian gigantan landon tuj apude. Ili iru hejmen kaj lasu nin direkti nian propran sorton.”

„Panjo, ne estu tiel bigota! Mi konas multajn rusojn, kiuj estas tute decaj homoj, bonaj civitanoj, eĉ rusojn, kiuj volas, ke Estonio estu sendependa kaj ekster Sovetunio. Kial ili ne kundecidu la vivon ĉi tie?”

„Mi jam diris, ili havas sian hejmlandon tuj apude.”

„Sed Panjo, grandparte la rusoj, kiujn mi konas, naskiĝis ĉi tie kaj sentas sin nur ĉi tie hejme – ili neniam eĉ vizitis Ruslandon!”

„Diru al mi, kiom el ili parolas estone? Kiom el ili konas nian literaturon, nian historion? Konfesu, ili tute ne intencas lerni nian lingvon.”

„Tio pravas. Sed se ili lernus ĝin? Ĉu tiam vi akceptus ilin?”

„Nia diskuto estas senbaza, ĉar vi scias same bone kiel mi, ke tiuj arogantaj rusoj neniam lernos la estonan lingvon. Ili kredas, ke la rusa estas universala lingvo. Ne, nia malgranda popolo devas sin protekti, devas decidi, kiu rajtas vivi ĉi tie.”

„Pardonu la esprimon, Panjo, sed via vidpunkto povus esti nomata ŝovinista.”

„Tia vorto ne timigas min, Virve. Kiu vivis en gulago, ne lasas vortojn lezi.”

Patrino kaj filino rigardis unu la alian. Malgraŭ reciproka korinklino ili ofte havis malsamajn vidpunktojn. Ili ja venis el malsamaj medioj.

„Nu, ĉiukaze miaj geamikoj venos ĉi-vespere. Estas similaj grupoj jam en kvar urboj. Ni celas elektojn, ĉe kiuj nur estonoj rajtos voĉdoni. Ni nomas nin la Kongreso de Estonio. Ni volas tiel premi Gorbaĉov kaj kompanion, ke fine ili juĝos saĝe liberigi Estonion.”

„Do Estonio havos du parlamentojn?”

„Jes, ĝis la homoj komprenos, ke Saavisaar kaj liaj amikoj ne vere reprezentas la genton, al kiu tiu ĉi landeto apartenas.”

Virve turnis la polmojn supren, kvazaŭ por indiki, ke ŝi ne plu povas komenti.

„Tre plaĉus al mi, se vi partoprenus.”

Virve ŝultrumis. „Nu, mi sidos inter vi, sed mi ne promesas, ke mi

konsentos.”

„Dankon, kara. Tio estas almenaŭ komenco.”

„Kiam venos la vizitontoj?”

„Laŭ interkonsento je la oka horo.”

„Bone, tio donos al ni iom da tempo por ludi kartojn. Ĉu bone?”

„Certe,” ridetis Lagle. Ŝi malofte senstreĉiĝis, sed kiam ŝi ludis *durak* kun Virve, eĉ la rusa nomo de la ludo ne forprenis de ŝia ĝuo.

Dum la aviadilo iom post iom surteriĝis, Travis literumis al si la nomon de la flughaveno: *Ŝeremetjevo*. Li jam lernis deĉifri la cirilan alfabeton kaj povis diri kelkajn utilajn frazojn, kaj krome konis la numeralojn, sed kiam la piloto parolis ruse, li komprenis neniun vorton.

Li ne sentis sin tre freŝa. Kvankam li dormetadis dum horoj, liaj longaj kruroj ne lasis al li vere malstreĉiĝi en tiu limigita spaco, kaj li vekigis sennombrajn fojojn. Sed post kelkaj horoj li renkontos Marina. Tiu penso vigligis lin.

Estis malrapida elaviadiliĝo pro la amaso da pakoj portendaj el la kajuto. Miŝa rigardis Travis preterpasantan, sed ne montris signon de rekono. Eble li estis pli ebria hieraŭ vespere, ol li aspektis. Ĉiukaze lia dika vizaĝo mienis morne: neniue Marina atendas lin, konkludis Travis.

Ŝeremetjevo montriĝis ne aparte invitema flughaveno. Malforte lumigita, griza, nebone flegata domo, ĝi devis lukti por sin ŝajnigi la internacia flughaveno de grandpotenco. Sed la formalajtoj de pasportstampado kaj dogankontrolo iris glate, kaj Travis senprobleme trovis siajn du valizojn alportatajn de karuselo.

Li iris al la ĝiceto, kie oni ŝanĝas monon. Li transdonis plurajn centojn da aŭstraliaj dolaroj kaj petis rublojn. La juna virino en la ĝiceto rigardis lin kaj ne emis ĉion konverti, sed ne sciis diri tion en eleganta angla. „Much much ...” Travis komprenis: ŝi volis averti lin, ke li konvertas tro, ke estus saĝe teni la okcidentan valuton kaj ŝanĝi ĝin nur laŭbezono. Se Miŝa ĉeestus kaj estus en sia instruema humoro, li dirus same. Travis tamen sciis diri *fsjo*, indikante, ke li ja insistas ŝanĝi la tutan sumon. Fakte li jam antaŭ longe decidis *ne* havi ĉe si „malmolan valuton” dum sia tempo en Sovetunio. Kontraŭ ĉies konsilo li ne volis povi iri al specialaj butikoj kaj uzi *valutij*: li volis sperti la vivon tie kiel aliaj ordinaraj senprivilegiaj homoj. Do la junulino siaflanke ŝultrumis, kalkulis la monon, devis ripetfoje kontroli la multajn biletojn, kaj poste transdonis al li tre dikan faskon da ruĝ-oranĝkoloraj 10-rublaĵoj; tiel dika, ke li devis distribui ĝin al diversaj poŝoj, ke neniue el la poŝoj tro elstaru. Li memoris, ke Belinda foje riproĉis lin pro la „senrespondeca kutimo” ne havi monujon kaj porti monon en iu ajn poŝo.

Necesis nun iri al la alia flughaveno sude de Moskvo, Vnukovo. De tie enlandaj flugoj startis. La aviadilo, kiu lin portos al Marina, estos tie. Li supozis, ke estos trajnservo aŭ busoj inter la du flughavenoj. Sed post vanaj demandoj al homoj, kiuj lin ne komprenis, li iris en la ejon de Inturist. Tie virino klarigis en komprenebla angla, ke necesos iri per taksio. Kaj se li iros tra la pordego dekstre, li trovos multajn taksiojn.

Do li kaptis la du valizojn kaj portis ilin en la indikitan direkton. Sed staris antaŭ li vico da diverse vestitaj viroj, dirante *taksi* aŭ *Vnukovo*. Travis ignoris ilin, supozante, ke ili estas neleĝaj privataj ŝoforoj – neniu el ili portis ion similan al taksiista uniformo, kaj la aŭtoj videblaj malantaŭ ili neniel similis al taksioj, kiel li ilin konis. Sed ju pli li iris, des pli li komprenis, ke tiuj duonkrimul-aspektaj viroj ja estas taksiistoj, kaj la malpuraj kaj parte kadukaj aŭtoj estas la luaŭtoj de Moskvo.

Kelkaj el la ignoritaj taksiistoj fakte postsekvis Travis, kaj estis klare, ke li devas elekti unu el ili. Grandkreska ulo en iom ŝiritaj armevestoj volis forpreni unu el liaj valizoj kaj perforte meti ĝin en la aŭton, al kiu li fingromontris. „Njet!” respondis Travis, li ne volis sin submeti al tia senkaŝa agreso. Do necesis diri „Da” al la konkuranto, kies aspekto malmulte vekis fidon: li portis nigran jakon kaj nigran ĉapon, kiuj vere pensigis pri mafia malaltrangulo.

La elektito akompanis Travis al sia aŭto, kiu estis je iomete pli pura ol la ceteraj videblaj. Li malfermis la kofrujon, enmetis la valizojn, kaj demandis, „Dolari? Marki? Franki? Funti? Cigareti?”

Travis diris, ke li havas nur rublojn. La viro evidente ne kredis lin, sed startigis la motoron kaj ili baldaŭ lasis Ŝeremetjevon malantaŭ si. Fakte pli rapide, ol Travis deziris. La viro veturigis multe pli rapide, ol la leĝo permesus – se estas leĝo pria, pensis Travis kun ioma konsterno. Ĉu la homo ne vidas, ke estas grandaj, akrrandaj truoj en la asfalto? Ĉu nenion signifas, ke ankaŭ la aŭto devas suferi pro la konstanta batado kaj saltado de la radoj?

Travis svage konsciis, ke ili veturas laŭ iom ronda itinero kaj preterpasas la centron de la grandurbo, sed li ne povis ĝue turisti. La taksiisto ŝajnis ema timigi ĉiun piediranton, kiu troviĝis ie apud la aŭtovojo. Maljunulo, kiu volis transiri la straton, devis, por sin savi, forgesi

pri ĉia digno kaj plenstreĉe kuri.

Eble la taksiisto kredis, ke li ion pruvis, ĉar subite lia veturigrimo malrapidiĝis. Li turnis sin al Travis, „Dolari? Marki? Cigareti?”

„*Tol'ko rubli. Fsjo ...*” kaj Travis faris larĝan geston, „*fsjo rubli.*” Sendube la gramatiko estis mankohava, sed la viro komprenis. Sed ne kredis. Kiu okcidentulo estus tiel stulta, ke li havus nur rublojn?

La veturo daŭris pli longe, ol ĝi laŭleĝe devus, pri tio Travis estis konvinkita, sed li ne plendis. Kvar fojojn la viro demandis per kiu valuto – aŭ *Marlboro*? – Travis pagos. La konversacio iĝis vere monotona.

Kaj jen antaŭ ili la flughaveno Vnukovo. La unua rigardo estis deprima. Kompare kun ĝi, Ŝeremetjevo ja estis altnivela.

La taksiisto malfermis la kofrujon kaj ripetis sian solan demandon. Kiam Travis diris ankoraŭ unu fojon, ke li havas nur rublojn, la viro kraĉis „Dvesti!” Travis komprenis. Ducent rubloj egalas al ... hm, oni pagus multe pli en Aŭstralio pro veturo tiel longa, do li transdonis 200. La taksiisto enmanigis la biletojn, turnis al Travis sian postaĵon, kaj faris, kvazaŭ li viŝus tiun korpoparton per la mono. Kiam la homo kolere eniris sian aŭton, Travis subite memoris, ke Marina skribis, ke 200 rubloj estas averaĝa monata salajro.

Kial do la viro ĉagreniĝis? Sendube temas ne nur pri la prezo, sed pri la valuto mem. Li jam informiĝis, ke en la plej multekostaj butikoj oni devas pagi per okcidenta valuto. Kia insulto kontraŭ la civitanoj de la lando, ke ilia propra valuto aĉetas nur duagradajn varojn! Estis certe, ke la *nomenklatura*, la reganta klaso, havas aliron al luksaĵoj.

Teorie, Travis pensis, komunismo detruas la klasstrukturon, metas ĉiujn sur bazon de egaleco. Sed reale Sovetunio donas krudan ekzemplon de eta reganta klaso kaj grandega plimulto sen privilegioj. En iu parto de la koro Travis trovis tion vere malgaja.

Nu, tio ne estu lia nuna problemo. En Vnukovo li devos akiri sidlokon. La flugon mem li jam pagis en Aŭstralio, do devus esti bagatela afero de kvin minutoj. Kaj je la 11-a horo li ekflugos al Marina.

Li portis sian bagaĝon en la tristaspektan domegon. Ŝajnis, aŭ ke granda nombro da lampoj ne funkcias, aŭ ke la lampoj estas tiel malfortaj, ke oni devas preskaŭ palpi sian vojon. En Ŝeremetjevo li vidis kelkajn afiŝojn en la angla aŭ germana aŭ franca, kiu helpis orientiĝi, sed en Vnukovo ĉio estis en la rusa, kaj li komprenis tre malmulton.

Li devis atendi kelkajn horojn, kaj lia stomako iom grumblis. Do unue li matenmanĝu. Sed en tiu griza mondo li eĉ ne trovis indikon, kiel atingi restoracion. Bonŝance estis Inturist-oficejo sur la dua etaĝo, do li trenis sian bagaĝon tien. Oficistino afable klarigis angle, kie estas la restoracio, kaj ŝi desegnis por li etan mapon. Li devis marŝi kelkajn centojn da metroj laŭ vojo, kiun li certe ne trovis instinkte, sed jen la manĝejo.

Kio unue orelfrapis: estis preskaŭ silento en la manĝejo, kvankam multaj jam sidis manĝante kaj eble dudek jam staris en vico por ricevi sian porcion. Travis unue metis siajn valizojn en angulon, prenis pleton, kaj iris stari malantaŭ tiuj silentemuloj. Estis neniu menuo, kaj baldaŭ li komprenis: ne estis elekto, ĉiuj ricevis samon. Unu virino vere laboregis: ŝi ŝovelis ion el unu granda ujo – poste Travis vidis, ke enestas terpoma kaĉo – kaj el alia – kiu enhavis preskaŭ likvan karotokaĉon – kaj fine pikis iun bestoparton kaj ŝovis ankaŭ tion sur la teleron. Kiam li estis sufiĉe proksima, Travis konstatis, ke temas pri kokaĵo, kaj tion pruvis la plumetoj ankoraŭ kroĉiĝantaj al la haŭto. Fine li ricevis sian tripartan manĝon, kaj iris pluen pagi.

Ĉe la kaso sidis tre dika virino; Travis rigardis la alian virinon kaj konstatis, ke la du povus esti ĝemelinoj, kaj li devis pensi pri la poemeto pri Tweedledum kaj Tweedledee, la du dikegaj knaboj, kiuj tiel similis inter si, ke oni neniam sciis kiel nomi ilin. Nu, ĉiukaze Tweedledee sidis malantaŭ peza malnova kasmaŝino, kiu konstante montris la universalan prezon: 6,40 rubloj. Travis ŝovis manon en poŝon kaj eltiris bileton kun la cifero 10. Li iris al la dika sinjorino kaj aplombe transdonis la bileton. La virino haltis mezvoje en sia preskaŭ aŭtomata kasistina laboro, kaj subite rompis la silenton per tre laŭta kriado. Ŝi flirtigis la monbileton kaj, konstatante, ke la kliento ne komprenas la rusan, kriis ion pli laŭte kaj gestis, ke li foriru. Ŝi ĵetis la monbileton sur la kastablon kaj prempolekse indikis, ke Travis prenu ĝin.

Travis staris mirigite. Kion ŝi celas per tio? Ĉar li ne tuj moviĝis, la

peza virino ekkaptis lian pleton, stamfis al la tri manĝuoj, per forko reĵetis la senofendan sed tremetantan kokaĵon en ĝian ujon, ĵetis la terpoman paĉon, kune kun iom da karota kaĉo, kaj la karotan kaĉon, kune kun iom da terpoma kaĉo, en la respektivajn ujojn.

Travis koleris, sed ĉar li estis senlingvulo, povis nur moviĝi flanken kaj ne plu obstakli la silentajn klientojn malantaŭ li. Kion fari? Iri al Inturist? Nu, tie li povus almenaŭ sin komprenigi. Li iris al siaj valizoj, sed ial ĵetis rigardon al la monbileto en sia mano. Aha! Ĝi estis dekdolara bileto de Singapuro! Hm, eble estus tamen bona ideo uzi monujon anstataŭ poŝojn ...

Nun li trovis absolute aŭtentan dekrublan bileton, trovis novan pleton, iris al la „vosto” de la klientaro, kaj ripetis la rutinon. Ĉi-foje li diris „rubli” kaj provis mildigi la kasistinon per rideto. Ŝi degne diris „da”, sed ne desupris de sia monto de supereco rilate al tiu senscia fremdlandulo. Kiam Travis provis donaci al ŝi la 3,60 rublojn, kiujn ŝi surtabligis, ŝi malŝate mane forviŝis lin de la loko kaj klare montris, ke ŝi ne akceptus trinkmonon de li. Li provis kredi, ke malgraŭ ĉiuj onidiroj ŝi estas honestulino kaj ne akceptas „koruptaĵojn”.

Travis serĉis manĝilaron. Li trovis forkon kaj kuleron el iu fleksebla plasto, sed neniun tranĉilon. Kaj li konstatis, ke neniua alia gasto uzas tranĉilon. Ĉu homoj kun tranĉiloj emas amoki en sovetiaj restoracioj? Nu, li iel sukcesos dispecigi kaj manĝi la kokon.

Li cerbumis pri la incidento rilate al la monbileto. Lia unua reago estis kolero kontraŭ tiu plumpa megero, kiu kredis sin supera nur pro tio, ke en tiu medio ŝi estas hejme, ŝi konas la lingvon, kaj li, Travis, estas kvazaŭ muta bebo. Kia aroganteco! Sed iom post iom li ridetis al si. Kiel oni traktus rusion en Aŭstralio, kiu insistus paroli ruse en publika loko? Kaj li duonkonscie atendis, ke oni kvazaŭ renkontu lin duonvoje, klopodigu sin por paroli angle. Hm, li pensis, kiam ni ĉiuj parolos esperante kaj evitos tiajn malagrablaĵojn?

Li eĉ ridis al si, kiam li memoris, kiel malafable la dikulino rifuzis la dek singapurajn dolarojn. Se nur ŝi scius, kiom pli ili aĉetus ol dek rubloj! Sed ŝia reago al lia plumpa provo doni al ŝi trinkmonon estis sobriga sperto: ĉu li siavice montris degnan kompataĉon al unu el la malriĉulinoj de la

mondo, ĉu li agis kvazaŭ riĉulo?

Li finmanĝis, trinkis sengustan kafon, kaj eliris. Estis tempo por demandi ĉe la Inturist-oficejo, kie akiri sidlokon en la aviadilo al Kievo. Devis esti la mezo de la matenaj horoj, sed en la grotosimila domego de Vnukovo ŝajnis esti noktomezo. Li ree trovis la oficejon, kaj la oficistino ree desegnis por li mapon, kiu montris la vojon al la oficejo, kie oni disdonas sidlokojn. Ŝi diris, ke estus saĝe iri jam nun tien, eĉ se lia flugo okazos post du horoj.

Travis opiniis, ke li tamen havos sufiĉe da tempo. Estus pli bone resti en loko, kie almenaŭ estis benkoj, ol ricevi sian sidlokon kaj eble devi resti en supozende malbela ĉambreto kaj atendi sian flugon. Li do decidis iom ripozi kaj legi, kaj iri nur iom antaŭ la flugo al la disdonejo de sidlokoj. Li devis longe serĉi benkon, sur kiu ne ripozis homaj postaĵoj, sed fine li vidis en angulo vakan lokon. Li eksidis kaj komencis legi magazinon. Li konsciis, ke li dormemas, kaj ke li legas la saman frazon du- aŭ trifoje kaj ankoraŭ ne tre bone kaptas al sencon. Li ne bone dormis en la aviadilo kaj ja estis ...

Kun eta skuiĝo li vekiĝis. Li bezonis iom da tempo por memori, kie li troviĝas – en Vnukovo! Li rigardis sian horloĝon kaj kun alarmo konstatis, ke estas la unua kaj duono posttagmeze. Lia aviadilo jam forflugis!

Aj! Marina atendos lin kaj li ne venos! Tio povis fuŝi la tutan vojaĝon – eble ŝi ofendiĝos kaj ne plu volos rilati al li. Kion fari?

Li enmanigis la du valizojn kaj serĉadis telefonon. Nenie li vidis ion similan, kaj daŭre pli maltrankviliĝis. Kie li trovu ion ajn en tiu ĉi malbenita loko? Ha! Fine li vidis ion, kio memorigis lin pri fotoj de telefonoj uzataj sur batalejoj en la Dua Mondmilito. Li levis la parolilon kaj diskis la numeron de Marina. Eble ŝi ne estis hejme, eble ŝi jam survojis al la flughaveno de Kievo. Tamen pli provis multfoje, sed ŝajne la telefono ne komprenis aŭ ne volis lin kompreni.

Kio nun? La sola loko, kie li povis esperi ricevi informojn, estis tiu oficejo de Inturist. Bonŝance ĝi estis facile trovebla malgraŭ la ĉirkaŭanta malhelo. La amikema oficistino, kiu jam kelkfoje lin helpis, ne plu deĵoris, sed li sukcesis komprenigi al alia virino tie, ke li volas telefoni la numeron,

kiun li skribis sur slipon. La virino provis atingi la numeron, sed estis nenia respondo.

Li sukcesis kunmeti du vortojn en la rusa: *kiam kaj Kievo?* La oficistino komprenis, kaj skribis sur la slipon *17h*. Do bone, li povos flugi je la 5-a p.t.m. Tio donis al li fidon, ke li tamen iel sukcesos kontakti Marina.

Do eble estis konsilinde iri tuj kaj akiri sidlokon. La diagramo donis instrukciojn kiel atingi tiun disdonejon. Pasigi kelkajn horojn en senornama kaj eble troplena ĉambreto ne estos plezuro, sed pli bone tion fari ol maltrafi la flugon duan fojon!

Fine li atingis la ĉambron kaj eniris. Li gapis. Unue ŝajnis, ke okazas ia senregula stratbatalo. Li staris for de la batalantoj kaj bezonis tempon por kompreni la strategion de la batalo. La ĉambron duonigis dika vitra vando. Aliflanke de la vando, tute videbla, sidis virino, kaj evidente estis ŝia laboro disdoni sidlokojn de diversaj flugoj. Sed, gvidate de iu nevidebla aparato, kiun nur ŝi vidis, ŝi faris la taskon popece: ŝi kriis, ekzemple, „Du por Simferopol” aŭ „Unu por Nikolaev” aŭ „Du por Odeso”. Tuj, kiam ŝi anoncis, ekestis brua sturmo al aperturo en la vando, tra kiu evidente oni devis ŝovi sian pasporton. Sed se ŝi akceptis nur unu klienton por Rostov, kaj dudek homoj volis tien flugi kaj ne emis atendi ankoraŭ kvaronhoron, ĝis ŝi refoje anoncos lokojn por Rostov, la rezulto estis, ke multaj samtempe provas atingi tiun aperturon per sia pasporto. Kelkaj eĉ pretis salti trans la dorson de aliaj por ĝin atingi, aliaj preferis buldozi sian vojon kaj flankenpuŝi la konkurantojn.

Travis longe rigardis tiun nekutiman kaj eĉ malpli plaĉan spektaklon. Li ne volis partopreni, kaj esperis, ke baldaŭ estos ia paŭzo en la kruda ludo. Sed li vane esperis. Daŭre venis novaj ludantoj, kaj se ili ne kubutume penetris en la grupon da luktantaj homoj, ili restis same kiel li nur spektantoj.

Li pripensis: se li ne „kunludos”, li maltrafos duan fojon la flugon al Kievo. Tiukaze li devos serĉi tranoktejon ie apud tiu ĉi deprima flughaveno. Li tiam devos reveni morgaŭ matene, stari flanke, kaj refoje ne akiri sidlokon, kaj tiam li devos ree tranokti ie apude. Teorie li povus pasigi la ceteron de sia vivo en tiu ĉi malloga regiono. Kaj eĉ Marina, kiu

tiel bele esprimis sin papere, sendube tute rezignos pri li – eĉ se li sukcesos atingi ŝin telefone, ŝi eble tute rezignos pri tiu homo, kiu ne komprenas la kutimojn de la ĉiutaga vivo en Sovetunio.

Do: ĉu rezigni pri sia „gentlemaneco” kaj sin ĵeti en la batalon? Aŭ pasigi la ceteran vivon kiel malaprobanta gentlemano? Travis decidis rezigni pri sia rolo de nobla kavaliro.

Kaj la lukto daŭris almenaŭ horon. Eĉ kiam finfine li proksimiĝis al la aperturo, tra kiu oni devis ŝovi sian pasporton, la aliflanka virino ŝajne forgesis, ke Kievo ekzistas. „Tri por Simferopol!” „Du por Nikolajev!” „Du por Odeso!” Travis preskaŭ malesperis, kiam venis la magiaj vortoj: „Unu por Kievo!” Li plenforte ŝovis sian brakon inter la du virojn antaŭ li kaj sukcesis traŝovi la pasporton.

Travis sentis eŭforion pro tiu sukceso. Liajn valizojn oni senprobleme akceptis, kaj li sekvis la ŝtuparon, kiu evidente kondukis al la aviadilo.

Enirinte la maŝinon, li iel komprenis, ke la flugo estas prokrastita. Nu, iom ĝene, ĉar ju pli rapide li kontaktos Marina, des pli bone. Tamen fine la aviadilo deterĝis.

^^^

Travis esperis, ke post kelkaj paŝoj li trairos la pordon, kiu kondukos al la parto de la flughaveno, kie nepasaĝeroj atendas la alvenantojn. Li haltis, surplankigis la valizojn, kaj lasis aliajn iri antaŭ lin. Ĉu li nervoziĝas kelkajn paŝojn antaŭ la klimaksa momento, la momento, kiam devus realiĝi liaj revoj de la pasintaj monatoj, ekde kiam li decidis iri al Marina? Li profunde en- kaj elspiris.

Subite serio da demandoj hezigitis lin. Kie li dormos? Jes, Marina skribis antaŭ nelonge, ke la kompanio, por kiu li instruos, aranĝis por li apartamenton, sed li supozis, ke tamen li pasigos la unuan nokton kun ŝi. Ĉu ili amoroŝ? Neniam ili skribis rekte pri tiu temo. Li certe ne insistus: li volis nenion fuŝi per malpacienco. Estos tempo por ĉio, ĉu ne? Kaj kion li diros al ŝi, kiam fine ili sin rigardos?

Aĥ, eble ŝi tute ne atendas lin! Kiel ŝi sciu, ke li venos per la posttagmeza flugo? Li ne povis ŝin averti kaj ne rajtis supozi, ke ŝi estas

telepatia.

Li enmanigis la du valizojn kaj faris la lastajn paŝojn.

Granda grupo da homoj staris por bonvenigi la pasaĝerojn, kaj tamen li tuj ekvidis la simbolon: ŝi tenis alte magazinon, kiu montris verdan stelon, la Esperanto-simbolon. Jes, tuj li rekonis ŝin.

Li alpaŝis kaj konstatis, ke ŝi ankoraŭ serĉas lin inter la viroj venantaj tra la pordo. Kaj subite ŝi rekonis la altkreskan viron, kiu venas rekte al ŝi. Rideto transformis ŝian esprimon de ioma zorgo al radianta bonvenigo.

Du paŝojn for de ŝi li surplankigis la valizojn kaj malfermis siajn brakojn. Larĝe ridetante Marina ĵetis sin al lia brusto. Senvorte ili brakumis sin. Li delikate kisis ŝian frunton, kaj ŝi glitigis siajn lipojn al lia buŝo. La unua kiso estis esplora, tenera.

Kion diri? Fine venis al li elokventa frazo, „Vi ja estas Marina, ĉu ne?”

Ŝi ridis, kaj li aldonis, „Mi ĝojas vidi vin.”

Ŝi interrompis sian ridadon. „Ĉu vi legis frazaron por komencantoj en la aviadilo?”

Li kunridis. „Ne, mia legaĵo estis *Teneraj momentoj kun kamarado Stalin.*”

Refoje ŝi ridis. „Blagulo! Sed ne diru tion tro laŭte ... eble oni kredus, ke vi estas komunisto! Probable estas ankoraŭ kelkaj de tiu specio en Sovetunio, sed ili devas sin kaŝi.”

„Nu, se la homoj ĉi tie komprenas nian Esperanto-konversacion, mi ĝojas!”

Ambaŭ ridis, kaj Travis demandis. „Kiel vi sciis, ke mi venas nun? Laŭplane mi devis veni horojn pli frue.”

„Jes, mi estis ĉi tie tiam. Mi konas la reputacion de Vnukovo, kaj esperis, ke vi sukcesos la duan fojon.”

„Do vi venis du fojojn hodiaŭ ĉi tien?”

„Jes,” ŝi parolis ŝajnkritikeme, „kaj mi esperas, ke penvaloris ... Cetere, estus bona ideo gardi viajn valizojn. Multaj ŝtelistoj vizitas stacidomojn kaj la flughavenojn, kaj alilandaj valizoj estas aparte altiraj al ili.”

„Kio? Tio ne eblas en la paradizo de la proletaro kaj kamparularo!”

Sed ĉi-foje lia politika aludo ne tiom amuzis ŝin. Li turnis sin kaj enmanigis la du valizojn. „Kien, ĉefino?”

„Ĉi-nokte vi dormos ĉe ni.”

„Ĉe ... ni? Vi kaj ..?”

„Venu. Mi klarigos.” Ŝi fingromontris al serio da busoj. „Tiu buso tie estas nia, kaj ŝajnas, ke ĝi estas forveturonta.”

Fakte la buso jam iris kelkajn metrojn, sed Marina kun aplombo alkuris antaŭ ĝin kaj mangestis, ke la ŝoforo atendu. Travis miris pri tiu memfida ago kaj atleta kapablo: ŝi vere estis hejme en tiu ĉi medio tiel fremda al li. La neceso postkuri ŝin, tenante du pezajn valizojn, okupis lin kaj ne permesis tro da cerbumado pri la vortoj ĉe *ni*.

Sed en la buso, kvankam ili babilis pri diversaj temoj, ĉefe pri la kompanieto, ĉe kiu li laboros, lia cerbo okupiĝis pri tiuj eble fatalaj vortoj. Ĉu ŝi vivas kun siaj gepatroj? Ĉu ... ne, ne povas esti! ... ĉu ŝi havas edzon aŭ amanton? Ĉu gefratoj kunloĝas kun ŝi? Ĉu ŝi kaj amikino dividas la lupagon de la apartamento? Ĉu ...?

Tamen Marina ne permesis lin levi la tiklan temon. Ŝi multe laŭdis liajn tre belajn leterojn kaj aldonis, „Mi ne miras, ke vi estas sukcesa ĵurnalisto. Vi certe scias uzi vortojn.”

„Nu, ne tro laŭdu min, kara Marina. Vi mem skribas tre flue kaj bildige.”

Kaj tiel daŭris la konversacio, ĝis la temo korespondado ŝajnis provizore elĉerpita. Fine li devis ĵeti al ŝi la demandon: „Marina, neniam vi

skribis ion pri ... e ... homoj, kiuj loĝas kun vi ...”

„Ne, vi neniam demandis. Sed Trevis, ĉi-nokte mi volas dormi kun vi. Jes, en la sama lito, en viaj brakoj.”

„E ... e ... Nu, ankaŭ tiun temon ni neniam diskutis ... Sed mi ne kontraŭus!”

„Kompreneble ni diskutis amoradon. Eble vi ne konsciis, kiom da erotiko estas en viaj leteroj, des pli, ĉar vi ne rekte uzis la vortojn.”

Li ekzamenis ŝian vizaĝon. Jes, estas la sama virino, kiu sopirigis lin dum monatoj, eĉ se la haŭto estas iomete malpli freŝa ol ĝi aspektas sur fotoj.

„Jen nia haltejo. Mi prenos unu el la valizoj. Jes, rapide, Trevis, niaj busoj ne longe haltas.”

Ili elbusiĝis. Estis nokto, sed mil lampoj brilis el mil fenestroj en giganta apartamentaro. Devis esti almenaŭ dek etaĝoj, kaj ŝajnis esti dekoj da apartamentoj sur ĉiu etaĝo.

„Ni loĝas sur la kvina etaĝo, tie maldekstre. Vidu, Janka montras sian kapeton ĉe tiu fenestro. Kompreneble li ne vidas nin, sed li scias, ke ni venas.”

„Janka?”

„Jes, mia filo.”

Travis glutis, sed ne havis tempon por fari pluajn demandojn. La belforma juna korpo de Marina svinge marŝis al la ĉefa enirejo. Travis rimarkis amason da rubaĵoj, grandparte paperoj, antaŭ la apartamentoj, sed tio ne okupis liajn pensojn. *Filo? Ĉu ankaŭ edzo?*

Ili senvorte atendis la lifton. Fine ĝi alvenis kaj tremante klakante malfermiĝis. Travis pensis pri filmoj el la tridekaj jaroj. Sed ne longe. *Edzo!?*

La lifto levis ilin hezitante kaj skuetante. „Marina, ĉu vi havas edzon?”

„Jes. Ha vidu, nia etaĝo.”

La skleroza maŝino skuetiĝante ellasis ilin, kaj Marina kaptis valizon kaj kondukis lin al pordo. Ŝi elpoŝigis ŝlosilon kaj diris, „Bonvenon!”

Kvazaŭ krevanta balono Travis ŝin sekvis en tiun ĉambraron, kiun li tuj povis juĝi tro mallarĝa kaj iom kaduka. La tapeto probable estis tridekjara. Janka, eble kvar- aŭ kvinjara, alkuris kaj brakumis sian „*mamuŝka*”. Blonda viro staris en la koridoro. „Trevis, jen Paŝa.”

Paŝa preterpasis Marina, etendis brakon salute al Travis, kaj ripetis sian nomon. La aŭstraliano robote akceptis la manskupon kaj diris „Travis”. Ĉar necesis *ion* diri, Travis demandis, „Ĉu vi parolas esperante?”

Paŝa ŝultrumis, iomete ridetis, kaj diris „Njet”, sed evidente almenaŭ la demandon li komprenis.

Travis sentis, ke li volas fuĝi. Ial li memoris, ke kiam li estis knabeto li faris grandan sablokastelon, nekredante, ke la marondoj iam atingos ĝin – kaj duonhoron poste la akvo senkompate kolapsigis kaj forlavis lian laboron. Kion fari? Senpense li taŭzetis la blondajn harojn de la knabo, „Saluton, Janka.” La knabo ridis kaj respondis per vortoj, kiuj signifis nenion al la malfeliĉulo.

Sekvis rapida konversacio inter Marina kaj Paŝa, kaj Paŝa diris ion al Janka. La knabo evidente ne volis kunfari, sed la patro insistis, kaj Paŝa kaj Janka eliris „promeni”. Marina kaj Travis restis solaj en la domo.

„Nu,” diris Marina, ageme, „ni metu viajn valizojn en vian ĉambron,” kaj ŝi trenis unu el ili en alian ĉambron kaj indikis, ke Travis sekvu. Li faris tion, sed ne sciis, en kiun strangan dramon li trafas. Fine, kiam la valizoj estis ŝovitaj sub liton, li devis diri, „Marina, mi tute ne komprenas.”

„Nu bone, ni parolu, sed dume vi devas ion manĝi.”

Ili iris en la manĝejon-kuirejon, kaj Travis konstatis, ke fakte li ja malsatas, sed ne pri tio li pensis.

Ŝi diligente sternis tablotukon, aldonis manĝilaron, kaj prenis aferojn

el forno. Ŝi surtelerigis jam pretan manĝon. „Pardonu, ĝi certe pli bone gustis antaŭ ses horoj. Sed, bonan apetiton!”

„Marina, mi estas malsata, sed antaŭ ol manĝi mi volas diskuti kun vi ... ĉion!”

„Ekmanĝu, mia kara. Trevis, vi sentos vin pli bone post manĝado. Mi vidas, ke la situacio vin ŝokas. Sed kredis, ke mi ja amas vin. Almenaŭ, ke mi amas mian korespondanton de la lastaj dek kvin monatoj. Do ek! Manĝu kaj trinku.” Ŝi prenis botelon da vino el ŝranko kaj verŝis en du glasojn.

Malgraŭ ĉio Travis ekmanĝis kaj eĉ faris idiotan demandon pri la kuirrecepto – lia patrino volonte eksperimentis pri novaj receptoj. Marina kunmanĝis kaj volonte respondis la demandojn detale, fakte tro detale por la komprenpovo de Travis. La vino bongustis, kaj ili malavare trinkis: eble iom da alkoholo helpus al li elturniĝi en tiu absolute neatendita situacio.

Fine li diris. „Kial vi ne skribis pri via familia vivo? Mi ĉiam supozis, ke ...”

La demando estis evidente atendita, sed Marina surtabligis sian forkon kaj zorge elektis vortojn. „Mia korespondado kun vi estis tre bela, aparta regiono de mia vivo, kiu transportis min for el nia griza, monotona ĉiutaga vivo. Vi vidis, ke Paŝa absolute ne interesiĝas pri Esperanto. Li ne estas en tiu parto de mia vivo. Kiam mi skribis al vi, mi dume preskaŭ forgesis, ke estas aliaj, malbelaj regionoj de mia vivo.”

„Romantikulino, ĉu ne?” Estis amara gusto en lia buŝo, kaj li intencis kaŭzi al ŝi doloron. „Ĉu vi neniam pensis, ke vi ŝuldas al mi klarigon?”

„Mi atendis, ke vi demandu. Kial vi ne demandis?”

„Eble mi timis legi respondon, kiu detruus mian revon.”

La sekvanta silento en la ĉambro konsciigis lin, ke venas bruoj el aliaj apartamentoj, ke vera solestado ne eblas en tia monstra konstruaĵo. Hezite Marina tintigis sian forkon sur la malplena telero kaj metis manon sur lian, kaj li ne rezistis. Li rigardis ŝin kaj trovis ŝin pli bela ol li estis

revinta. Ŝia vizaĝo havis vervon neniel kapteblan sur filmo. „Marina, diru al mi, ĉu vi amas Paŝa?”

„Hm, nefacile respondeble. Ni diru, ke mi multon ŝuldas al li.”

„Sed se vi amas lin – aŭ ŝuldas al li – kiel vi povis samtempe korespondi tiel intime kun mi? Nu bone, vi jam iom klarigis tion. Sed ... ĉu Paŝa ne kontentigas vin? Ĉu li estas impotenta?”

Ŝi mallonge ridis. „Tute male! Mi dirus, ke krom gitarludado kaj kantado lia priokupiĝo estas seksumado.”

„Do kial, se li volas multe seksumi, kial li permesas, ke lia edzino ... kun alia viro ..?”

„Paŝa volas eksperimenti. Li foje seksumas kun aliaj virinoj, kaj li neniam kaŝas tion. Sed nun li diras, ke rutina seksumado ne tre stimulas lin. Li volas esti membro de triopo, ĉu li kun du virinoj, ĉu li kaj alia viro kun unu virino, ne gravas.”

„Aĉ! Pardonu, sed kiel tio rilatas al amo inter viro kaj virino?”

„Ankaŭ mi ne scias, sed Paŝa estas tute honesta. Li tute ne kontraŭus, ke vi kaj mi amoru, sed li esperas pri invito aliĝi. Li eĉ eliris kun Janka, ke ni aranĝu tion.”

Travis trinkis pli da vino. Do Paŝa estis honesta. Nu eble, eble pli honesta ol Travis. Sed amora triopo – ne, la ideo tute ne plaĉis.

Marina jam finmanĝis, kaj Travis konsciis, ke pro priokupiĝoj li nur sporade manĝis.

„Trevis, mi divenas, ke eble vi volas tuj aĉeti bileton kaj reiri al Aŭstralio. Mi iom timis tion antaŭ via alveno, sed mi pensis, nu, eble Trevis estas malfermita mondumulo. Eble mi kredis, ke tiurilate vi similas al Paŝa. Vi malkaŝe skribis pri vi kaj Belinda. Mi diris al vi, ke mi ŝuldas al Paŝa. Antaŭ ol mi ekkonis lin, mi estis kvazaŭ monaĥino, tre pruda. Li montris al mi, ke seksumado estas normala, bela parto de la vivo. Kaj lia honesteco estas estiminda.”

„Ŝajnas, ke li bone instruis ... Marina, vi pravas, unu duono de mi volas flugi reen al Aŭstralio. Sed la alia duono rebatas, ke mia veno ĉi tien havas ian sencon, eĉ se ne tiun sencon, kiun mi imagadis ĝis antaŭ unu horo.”

Marina sentis dolorpikon, sed decidis uzi la plej praan inan altiraĵon.

„Trevis, mi vere volas amori kun vi. Tre. Ankaŭ mi multe revis pri tio. Estu via decido, ĉu Paŝa estos invitita.”

„Ne, mi ne povus! Volas diri, mi ja povus amori kun vi – mi imagis tion dekmil fojojn, sed trian mi ne volas inviti.”

„Do, konsentite? Vi kaj mi dormos tie,” ŝi fingromontris al la ĉambro, kie kuŝis liaj valizoj, „kaj Paŝa kaj Janka tie.” La alia estis miniatura ĉambro, supozende nur por infanoj.

„Mi ne scias, ĉu mi kapablos ...”

„Ne antaŭjuĝu. Trinku pli da vino kaj lasu viajn inhibiciojn foriri. Mi iam lernis tion.”

Travis elspiris kaj diris, „Marina, eĉ se ni amoros ĉi-nokte, kio sekvos? Ĉu vi ne pensas pli morgaŭ kaj postmorgaŭ? Kio pri vi kaj Paŝa? Kio pri vi kaj ... mi?”

„Mia kara Trevis, ni estas ambaŭ maturaj homoj, ĉu ne? Ni ne devas longe amindumi, tion ni jam faris. Ni jam scias, ke ni volas teni unu al alian en la brakoj. Por mi tio provizore sufiĉas. Poste ni vidu, kiel la vivo evoluos.”

„Pardonu, sed mi neniam tiel leĝere vivis.” Iom kruele li imitis ŝian intonacion, „Ni vidu, kiel la vivo evoluos ... Ĉu tio ne ŝajnas al vi mem ... nu, senrespondeca?”

„Se vi restos iom en Sovetunio, vi eble pensos simile. Nia vivo estas kutime neĝoja, ni ĉiuj esperas pri plibona evoluo. Ni scias, ke *tiel ĉi* ni ne povas daŭre vivi. Ĉu vi ne spertis hodiaŭ, ke la ĉiutaga vivo estas bruta lukto por ne subiĝi? La vivo *devas* ŝanĝiĝi! Morgaŭ *devos* esti pli bona ol hodiaŭ. Ĉu vi ne memoras, kion mi skribis pri nia griza ĉiutago, kaj miaj

revoj pri paca vivo en tia lando, kia via, tiel for de la tumultoj de la cetera mondo?”

„Bonvolu ne imagi, ke Aŭstralio estas paradizo, Marina. Sed mi supozas, ke ... nu, kompare kun tio, kion mi hodiaŭ spertis, ĝi ja permesas pli dignan publikan vivon.”

„Mi ne estas tiel naiva, ke mi imagus, ke ĉiu alia lando ebligas pli akceptindan vivon, sed laŭ ĉio, kion mi legis kaj imagas, Aŭstralio estas vere lando de bonŝanculoj. Eĉ se ili eble ne vere meritas tiun bonŝancon.”

„Ĉu pro tio vi korespondis kun mi?”

„Ne nur. Kiam mi legis vian korespondpeton en *Tutmonda*, la fakto, ke vi vivas en Aŭstralio, estis motivo. Sed baldaŭ pli gravis la homo Trevis ol la lando.”

Ree ŝi tuŝis liajn manojn, kaj li sentis tikliĝon ĉe la nuko.

„Nu ...” li indikis, ke li volas ankoraŭan porcion da vino, „ni provu ...”

Preskaŭ senparole ili eltrinkis la duan glason. Marina rompis la silenton inter ili. „Vi devas esti laca post tiu tre longa flugo. Kaj horzonozo? Jes, mi vidas tion ĉe viaj okuloj. Paŝa kaj Janka revenos baldaŭ. Do iru en vian – nian – ĉambron kaj ripozu, eĉ dormetu, se vi volas. Poste mi venos al vi. Venu do.”

Ŝi akompanis lin en la dormoĉambron. Antaŭ ol foriri ŝi kisis lin kaj frot-karesis lian vizaĝon. „Ĝis baldaŭ.”

^^^

Travis senvestigis sin kaj provis ripozi. Li kuŝadis kaj provis ne pensi pri la neniigo de siaj revoj. Sed dormo estis tre proksima. Kvazaŭ de malproksime, obtuze li eksciis, ke la du „promenintoj” revenas. Paŝa diris

ion laŭte, sed Marina flustris ion kaj poste ĉiuj parolis tre mallaŭte. Kaj Travis ja preskaŭ dormis. Tiel proksime al la plenumiĝo de siaj revoj pri Marina. Sed la situacio estis senespera. Se ŝi estis romantikulino, la epiteto eĉ pli aplikeblis al li – homo kiu vivas de revoj, kiuj ne havas la bazon, kiun li donis al ili. Dum la manĝo li ofte rigardis ŝin, kiel malsata viro okulumas virinon post longa periodo sen seksumado, kaj jes, ŝi estis eĉ pli dezirinda, ol li esperis. Sed ies *edzino*? Ĉu li estis mem tro konvencia en sia sinteno? Kial ne amori kun la edzino de alia viro, aparte se la edzo eĉ stimulas tion? Sed nekredeble, ke *lia* Marina apartenas al alia viro. Ŝiaj leteroj neniel pensigis lin pri tia eventualo, liaj revoj baziĝis sur tute alia bildo de ŝi.

Lia cerbumado malakriĝis, kaj li volis cedi al la dormemo kaŭzita de tiu longa flugo kaj la streĉa tago. Nur kiam li revekiĝis, li konsciis, ke li dormis. Li estis vekita de sibla flustra konversacio inter Marina kaj Paŝa. Paŝa, li nun konstatis, fakte paŝas, iras tien kaj reen en la mallarĝa domo, kvazaŭ viro en hospitalo atendanta informon pri iu paciento. Ĉu Paŝa vere povus dormi en la infanĉambro, dum li, fremdulo, dormas kun Marina? Ĉu tio estis universala homa situacio, aŭ ĉu ĝi vere spegulis la misfunkciadon de la vivo en Sovetunio?

Iam – li ne sciis, kiom da tempo jam pasis – Marina venis al li, sed ne tute fermis la pordon. Ŝi lasis fali sian negliĝon kaj staris antaŭ li. Ho Dio, ŝi estis ja tiel altira! Malgraŭ sia laceco li sentis pulsadon de erotika deziro trakuri la korpon. Ŝi mallevis sin kaj ekkuŝis apud li, kaj tiam ĵetis la brakojn ĉirkaŭ lin. Travis ne rezistis, kiam ŝi komencis karesi kaj kisi lin. Li sentis, ke lia hezitemo amori ekmalaperas. Li respondis sampasie al ŝiaj tuŝoj.

Sed ĝuste tiam Paŝa preterpasis la pordon, kaj Travis tre klare konsciis, ke la pordo permesas al li enrigardi. Travis eksidis rapide. „Marina, ĉu ni fermu – eĉ ŝlosu – la pordon?”

„Mi promesis al Paŝa, ke se li ne rajtas partopreni, almenaŭ li povos de tempo al tempo spekti.”

„Ho Dio! Ne! Kara Marina, bonvolu vesti vin. Mi faros same. Jes, mi volas dormi kun vi, sed *nur* dormi. Mi esperas, ke vi komprenas.”

Marina volis ion diri, sed rezignis. Ŝi vestis sin kaj ekkuŝis apud li, sed ne provis plu tuŝi lin. Subite ŝi eksidis kaj lasis fali la kapon kaj preskaŭ plorante diris, „Trevis, pardonu milfoje! Nun mi vere hontas! Nun mi estas la malnova Marina, kiu ankoraŭ ne renkontis Paŝa. Nun mi vin komprenas. Pardonu! Ni ne amoros, sed bonvolu resti mia amiko ...”

„Nenio pardonenda, kara. Jes, ni restu geamikoj. Kaj nun ni dormu, mi petas.”

Travis dankis pro la elĉerpiĝo, kiu permesos al li dormi. Kia tago! Jes, mi povus vere ami ŝin, sed tio estas barita. Aĥ, mi dormu kaj provu ĉion forgesi ...

Ĉaste ili kuŝadis unu apud la alia, sentuŝe.

Paŝa iam ĉesigis sian vanan tien-kaj-reenadon, kaj iris grumblante dormi sur la planko apud la lito de Janka. Ankaŭ por li la nokto estis erotike desaponta.

^^^

La matenmanĝo estis ne tre gaja afero. Kiam fine Marina vekis la dormanton, Paŝa estis forironta el la domo, sed revenis al la ĉambro de Janka kaj surŝultrigis gitaron. Travis provis diri ion, sed nur kapgestis, kaj li ne komprenis la abruptan kaj mallongan respondon de la viro, kiu eliris kaj iom brue fermis la pordon. Marina okupiĝis pri Janka, kio estis avantaĝo, ĉar nek ŝi nek Travis vere volis babilo.

Marina donis al Travis grandan porcion de ovoĵ kaj pano, kaj Travis divenis, ke kutime ili manĝas tre malmulte. Tiu ĉi regalo estis morna memoraĵo pri liaj multmonataj revoj pri intimaj manĝoj – kaj multo alia – kun Marina.

Fine Marina diris ion. „Paŝa laboras en fabriko, sed supozas, ke baldaŭ li perdos tiun postenon. Ĉiukaze li malamas tiun laboron. Pro tio li kunportas sian gitaron.”

„Ĉu li amuzas la kolegojn per muziko.”

„Jes. Fakte li estas iom talenta. Li verkas proprajn kantojn. Tiel li unue

gajnis mian koron.”

„Vi skribis pri via laboro en butikoj. Ne tre bona posteno por amantino de literaturo.”

„Vi pravas. Kaj Paŝa volis esti profesia muzikisto. Sed nek li nek mi havas kontaktojn, kiuj helpus nin en kariero.”

„Hm. Marina, ni ne parolu pri hieraŭ, ĉu?”

„Trevis, ĉu vi kredas, ke mi volas?” Ŝia voĉo estis senelana, malsonora. „Vi scias, ĉu ne, ke mi nun hontas, ke mi metis vin en tiun ... tiun stultan situacion. Ne, ni ne plu parolu pri tio.”

„Konsentite.” Travis sin demandis, ĉu tio estas la formala fino de la revoj, kiuj donis spicon al lia vivo.

„Mi liveros Janka al nia sola fidinda najbarino kaj gvidos vin al la lernejo, ĉu bone? Poste mi devos iri al mia butikoj.”

„Elkoran dankon.”

^^^

Kiam ili eliris el la apartamentaro, la mizera stato de la areo antaŭ la domo iom ŝokis Travis. Rubaĵoj ĉie. Malgraŭ la ŝildo kun blankaj literoj sur ruĝa fono, kiuj provis persvadi la loĝantojn teni alte la standardon de „nia socialisma kulturo” (tiom li komprenis), estis tute klare, ke la homoj ignoras la sloganon kaj ne sentas ian ajn respondecon pri la estetiko de sia loĝloko. Unu el la originaj celoj de komunismo estis krei senton de komunuma solidareco inter homoj, sed ŝajne la malo estis atingita tie ĉi.

Marina portis unu el la valizoj, kaj refoje li admiris, kiel facile kaj gracie ŝi tion faras. Ŝi gvidis lin al stacio de la subtera trajnservo, kaj tie fine li vidis ion, pri kio la reĝimo rajtis iom fanfaroni. La stacio estis bonguste dekoraciita de mozaikoj montrantaj momentojn el la historio (certe la

reĝimo elektis kiujn momentojn glorigi). Marina petis Travis resti proksime al ŝi, ĉar en la kunpuŝiĝo de tiom da homaj korpoj ili facile apartiĝus. Travis kun melankolia plezuro restis tuj apud la belulino, kiun aliaj povus kredi lia. Aĥ, li diris al si, forgesu tiajn pensojn! Revoj eks!

Estis ne facile manovri la valizojn inter la kunpremiĝantaj homoj. Tamen fine ili atingis la stacion, kie necesis eliri.

^^^

„Maria Grigorievna, jen Trevis Siganoŭ el Aŭstralio.”

Travis skuis la manon de la altkreska, karnoplenta virino kaj diris angle, „Mi estas kontenta vin renkonti.”

Maria Grigorievna respondis en tute bona, iomete akĉentita angla, bonvenigante Travis al Kievo.

Marina diris, ke evidente ŝia interpreta servo ne estas bezonata, ke fakte ŝi mem ne komprenas ilian konversacion kaj nur ĝenus. Ŝi diris al Travis, ke ŝi atendos lin en la vestiblo, ŝia vorto por nomi la ŝrankograndan ĉambreton antaŭ la klasĉambro, kie Maria Grigorievna nun sidis. Travis dankis Marina, dum ŝi foriris. La tutan matenon ŝi estis tre kvieta, faris nenian provon proksimiĝi al li. Se hieraŭ li estis sternita pro seniluziigo, hodiaŭ ŝi ŝajnis pli suferi ol li. La trista Marina estis neniel malpli altira ol la memfida de hieraŭ.

„Ĉu vi havas demandojn, s-ro Siganoŭ?”

„Jes, kaj la unua estas, kial ne nomi min Travis?” li ridetis.

„Kun plezuro, Travis.” Ŝi eĉ prononcis la anglan a ĝuste.

„Kaj kiel mi nomu vin? Maria Grigorievna estas tre longa formo, ĉu ne?”

„Jes, por angloj, jes. Ni rusoj kutimas uzi tiajn formojn. Nu bone, nomu min Maria.”

„Konsentite. Nu, jes, mi havas multajn demandojn. Unue, Marina diris, ke vi aranĝis por mi apartamenton.”

„Jes, poste Igor akompanos vin tien. Li venos post duonhoru. Jes, li estas mia edzo.”

„Bone. Kaj nun, pri la kurso aŭ kursoj, kiujn vi ofertas. Ĉu vi havas kursplanon? Kion ni atendu, ke la studentoj lernu dum specifa kurso, kaj tiel plu?”

„Nu, vidu, Travis, ni scias, ke bona instruisto mem plej bone juĝas, kio estas lernebla dum kurso. Necesas unue konatiĝi kun la studentoj, kaj poste ni scios kion celi, ĉu ne?”

„Do ne estas planoj. Ĉu estas tekstoj por la studentoj?”

„Ankoraŭ ni ne scias pri taŭgaj. Via kurso estos pionira en Kievo. Sovetiaj instruistoj ne scias paroli pri merkata ekonomio, la banka sistemo, kaj tiel plu. Kaj do ankoraŭ ne estas kurslibroj. Sed ni fidus, ke vi provizos la materialon.”

„Ĉu eblas aboni anglalingvan periodaĵon?”

„Hm, pri tio ni ne pensis, sed ĉiukaze la kosto estus alta, kaj ni ankoraŭ ne ricevis la kurskotizojn.”

Travis antaŭvidis problemojn. Kion li sciis pri la kapitalisma sistemo? Kaj eĉ ne estos ĵurnalo, kiun li povus uzi. „Ĉu eblas almenaŭ fari fotokopiojn?”

„Travis, ni ŝatus tion fari, sed refoje temas pri altaj kostoj. Vi trovos, ke niaj lernantoj kutimas elturniĝi kaj bone lerni. Se vi diktos la materialon, ili fidele ĉion kopios.”

Travis rigardis la ĉambron. Ĝi eble estis iam klasĉambro por bazlernejoj. Maksimume ĝi sidigus dudek plenkreskulojn. „Maria Grigorievna, mi atendis, ke ... nu finfine, *kion* ni havos por niaj kursoj?”

Maria Grigorievna ekstaris, movis sian pezan korpon en lian direkton, metis siajn manojn sur liajn ŝultrojn, kaj diris, „Travis, ni havas *vin*, ĉarman homon kaj veran anglon!”

„*Mi* estas la altiraĵo! Dio mia, sed mi ne estas anglo, kaj mi estas kontraŭkapitalisto!”

„Mi rivelos al vi sekreton, Travis. Delonge ni kun Igor planis malfermi ĉi tian lernejon, sed la afero iĝis konkreta nur kiam s-ro Bondarenko – li estas esperantisto kaj amiko de via gastigantino s-ino Lyskov ...”

„De Marina?”

„Jes, pardonu, ni konas ŝin nur per la familia nomo. Nu, kiam s-ro Bondarenko diris, ke angleparolanta sinjoro, instruisto de la angla al alilanduloj, venos al Kievo kaj serĉos instrulaboron, ni firme decidis fondi nian lernejon. Vi estos nia unua instruisto, nia atuto. Sendube fondiĝos baldaŭ similaj lingvolernejoj kaj mi antaŭvidas, ke ankaŭ ili volos vin dungiti, sed mi esperas, ke vi restos ĉe ni, dum vi estas kontenta pri ni kaj ni pri vi.”

„Maria, mi sentas grandan pezon sur miaj ŝultroj. Do *mi* estas la fondoŝtono de via entrepreno ... Kaj se mi estos tute malkapabla, pigra, malhonesta ..?”

Ŝi ridetis tre amikeme. „Mi rigardas vin kaj scias, ke vi ne estas tia, kaj mi estas tre kontenta pri viaj demandoj – vi montris al mi, ke vi vere volas atingi bonajn rezultojn. Mi ŝatas ankaŭ vian aspekton kaj karakteron. Vi faras bonan impreson. Kaj okulfrapas, ke ankaŭ al s-ino ... al Marina vi imponas.”

„Hm, ni parolu nun pri horoj kaj pago, Maria Grigorievna...”

^^^

Pasis kelkaj semajnoj. Travis estis kontenta pri sia klaso, vigla grupo

da grandparte junaj, ambiciaj homoj. Estis iom pli da virinoj ol da viroj, kaj li ne povis ne konscii, ke kelkaj el la virinoj estas altiraj. Kvankam la vivo ne estis facila en Kievo – li ankoraŭ ne kutimiĝis al la ĉiutaga neceso postĉasi ion por manĝi ekster la tre magre provizataj manĝbutikoj (*gastronomij*) – li juĝis la virinoj en la urbo ĝenerale la plej belaspektaj, kiujn li iam ajn vidis. Kaj ŝajnis al li, se juĝi laŭ la babilado de la klasanoj, ke estas multe da seksumado. Li neniam supozis, ke Sovetunio estas loko de seksa libereco; tio ne kongruis kun la okcidenta koncepto pri la landego.

Plaĉis al li kaj flatis lin, kiel la studentoj lin rigardas. Ili probable juĝis lin bela fraŭlo el okcidenta, prospera lando, kvankam li mem neniel sin sentis reprezentanto de la riĉaj landoj. Sed esti la celo de virinaj rigardoj helpis mildigi la profundan seniluziigon ligitan al la nomo Marina. Li ankoraŭ renkontis ŝin iom ofte, ĉar ŝia laborloko estis proksima al lia lernejo. Foje li invitis ŝin en la kafejon Ĥriŝĉatik, kie artemaj homoj ŝatis ariĝi. Estis momentoj, kiam li sentis spasmon de deziro al ŝi, sed pli kaj pli ili glitis en amikecon, kiu ŝajne elbaris erotikon. Kompreneble ilia uzado de komuna lingvo estis forta ligo. Eĉ la plej bonaj el liaj lernantoj de la angla estis multe malpli kapablaj libere paroli kun li.

^^^

Dum unu el iliaj renkontiĝoj Travis diris, „Marina, vi neniam mencias vian laboron. Ĉu ĝi estas vere tute nekontentiga?”

„Mi ne fieras pri ĝi.” Post iomete ŝi decidis klarigi. „Mi laboras en manĝaĵbutiko aliflanke de la rivero. Fakte unu el la pli bonaj, ĉar kutime ni havas sortimenton da aĉeteblaj varoj. Mi vidis aliajn *gastronomij*, kie estas nur unu-du varoj sur la bretoj.”

„Kaj kion vi faras? Ĉu vi servas al klientoj?”

„Grandparte jes. Sed vidu ...” ŝi donis nekutime amaran rideton, „ni kolegoj ĉiuj ... a, kiel mi esprimu tion? Ni diru, ke ni servas ankaŭ al ni mem.”

„Pardonu, mi ne komprenas.”

„Unu fojon en du semajnoj venas kamiono kun manĝaĵoj al nia butikio. Al nia malantaŭa korto, kie neniu vidas. Kutime tiu kamiono havas almenaŭ sufiĉe da varoj por stoki multajn el la bretoj. Mi ne scias, kiu aranĝas tion, sed mi supozas, ke nia ĉefo havas siajn kontaktojn, kaj ni ricevas privilegian servon.”

Travis rigardis la belan vizaĝon, kiu estis nekutime severaspekta, kaj li sciis, ke ŝi nur komencis la rakonton.

„Jes, la kamiono venas kaj la tuta kolegaro iras helpi la du kamionistojn malpaki. Ni iras ĉiu kun propra sako.” Ŝi paŭzis. „Nu, ni ja malŝarĝas la kamionon kaj metas la varojn sur la bretojn en la butikio.” Alia paŭzo. „Pli ekzakte, ni metas eble sepdek kvin procentojn de la varoj sur la bretojn. La ceterajn ni metas en nian propran sakon. Post noktiĝo ni iras hejmen kun plena sako, esperante, ke neniu vidos nin. Sed eĉ se iu vidus nin, ne gravus – ili certe scias, kion ni faras, kaj eble eĉ envias nin, ke ni povas ‘pruntepreni’.”

„Do vi volas diri, ke ŝtelado de varoj estas ĝenerala?”

„Universala, jes. Unue mi tre hezitis fari tion, ĉar mi ne volonte ŝtelas, sed Paŝa riproĉis min. ‘Prenu,’ li diris, ‘vi havas eblon, kiun mi en mia fabrikaĉo ne havas. Kaj forgesu viajn inhibiciojn, ĉiuj ŝtelas, kial ni ne?’ Do jes, mi ŝtelas por iom pligrandigi nian mizeran hejman stokon.”

„Ĉu estas tiel en la tuta lando? Ĉu ĉiuj ‘prunteprenas’ varojn de la ŝtato?”

„Laŭ miaj scioj, jes. Oni devas trovi manieron ‘organizi’. Ekzemple, unu el miaj amikinoj estas instruistino. Ŝi povas iom enspezi per tio, ke ŝi donas bonajn rezultojn al pigraj, ŝtipkapaj infanoj de eminentaj partianoj. Ĉiu devas iel ekspluati la sistemon.”

„Aj,” diris Travis, „tio estas dolora afero. Mi pripensas la originojn de socialismo. Ke ĉiuj volonte kontribuu al la komunumo kaj ricevu de la komunumo tion, kio necesas por deca vivo. Laŭ viaj vortoj ekzistas ĉi tie neamata nepersona ‘komunumo’, de kiu ĉiu devas ŝteli.”

„Jen la faktoj de la vivo, kara Trevis. Estu dankema, ke ne estas tiel en via lando.”

„Mi ankoraŭ preferas kredi, ke tio ĉi estas travestio de socialismo, kaj ke humana socialismo eblas.”

„Via idealismo ne longe daŭros ĉe ni.”

^^^

Iun tagon ili du kafumis en la aparta kafejo. Kiam ili eliris sur la straton, Marina portis bluan robon kaj Travis flavan puloveron. Subite granda grupo da manifestaciantoj ĉirkaŭis ilin, portante afiŝojn kaj la flava-bluan ukrainan flagon, kaj kriante ion en la ukraina lingvo. Marina kaptis lian kubuton kaj tiris lin egalpaŝe marŝi kun la manifestaciantoj. „Vi portas flavon, mi bluan – ili probable supozas, ke ni estas parto de ilia afero. Vi povos sperti senpere iom de nia politika vivo.”

La manifestacio estis evidente kontraŭregistara, sed ĝis nun ĝi estis pli elana ol violenta. La multaj flagoj estis ja preskaŭ samkoloraj kiel la vestoj de la paro. Iu ekbatis tamburon, kaj iu alia ekkantis ion, kio ŝajnis al Travis tradicia marŝkanto. La melodio rapide eliris el ĉiuj buŝoj, sed Marina ne kantis. Ŝi komprenis lian ĉuan rigardon kaj flustris al li, „Mi ne konas la ukrainan lingvon. Mia familio estas de kelkaj generacioj ‘rusigita’.”

Ili atingis iun grandan domon. „La loka magistrato, la *sovjet*,” Marina klarigis. Iu viro kun forta korpo kaj laŭta voĉo ekkriis sloganojn per laŭtparolilo, kaj evidente oni kondamnis ion.

„Ni iru, ĉi tio ne interesas vin, Trevis. Kaj mi devos baldaŭ trafi buson.”

La marŝintoj nun staris sen ajna formacio antaŭ la magistrato, kaj la du facile apartiĝis de la ceteraj korpoj kaj formoviĝis en direkton diktitan de Marina.

„Marina, kie estas Paŝa? Ĉu li vartas Jankan?”

„Ne, li ankoraŭ laboras. Janka estas ĉe la patrino de Paŝa.”

Kaj la patrino de Janka estas kun fremda viro, pensis Travis. Sed tio ne ŝajnis iel problema al Marina, kaj supozeble ne al Paŝa. Ĉu ilia elasta interrilato aŭguris dezirindan evoluon de geedza kunvivado, rezigno pri tradiciaj ĵaluzoj kaj posedemoj? Travis decidis ŝanĝi la direkton de la konversacio.

„Kiam la loka Esperanto-grupo renkontiĝas kaj kie?”

„Estas diversaj grupoj, sed mia renkontiĝas en domo en Krasnaja Armejskaja je la sepa vespere ĉiulunde. Ĉu vi ŝatus partopreni?”

„Kompreneble, mi volas renkonti —, Li eksilentis. Ĉu li insultus ŝin, se li dirus, ke li ŝatus renkonti novajn homojn, antaŭ ĉio virinojn? Ĉu ŝi ĵaluzus? Probable ne.

„Jes, tion mi supozis. Mi kondukos vin tien la venontan lundon.” Kaj ŝi nomis lokon, kie ili renkontiĝu, kaj li skribis la detalojn en sian etan poŝkajeron.

Ili iris pluen, kaj Travis volis scii pli pri la manifestacio. „Marina, kion celas tiuj homoj? Ĉu sendependecon ekster Sovetunio?”

„Jes. Ili estas dividitaj inter si pri diversaj aferoj, sed ĉiuj volas sendependecon. Eble vi scias, ke el ukraina vidpunkto la historio estas serio da subpremiĝoj far la rusoj oriente kaj la poloj okcidente. Ukrainio kiel lando neniam vere ekzistis, sed tiuj homoj volas tre baldaŭ naskigi ĝin.”

„Mi rimarkis fortan kontraŭregistaran senton inter miaj lernantoj. Ĝenerale ili estas amikema grupo, ili kunportas trinkaĵojn kaj biskvitojn por dividi kun aliaj kaj kun mi. Kutime ni rilatas tre bone, sed pasintsemaje mi havis malagrablan sperton.”

„Kio okazis?”

„Nu, mi kutime finas lecionon per iom gvidata konversacio pri io, ke ili

ekzercu sian parolkapablon. Kaj mi pensis, ke ĉiuj devis iam studi marksismon-leninisman, do eble tiu estus bona temo.”

Marina ridetis. „Ĉu universitataj studentoj en Aŭstralio diskutas la Bibliion?”

„Nun mi komprenas, kion vi volas diri. Subite mi trovis, ke ili malbonhumore silentas. Fine Oleg – li ofte estas porparolanto de la grupo – diris, ‘Travis, jen temo, kiun ni neniam plu volas diskuti.’ Ankaŭ mi eksilentis, lerninte lecionon.”

„Jes, la malkontento pri la registaro kaj ĝiaj tradicioj estas tre profunda, politike, emocie. Tia la situacio ne povas daŭradi.”

„Kion vi volas, ke okazu? Ĉu vi volas, ke Ukrainio sendependiĝu de Sovetunio?” kaj li konstatis, ke ili marŝas laŭ trotuaro en la direkton al la Ruĝa Universitato. „Same kiel preskaŭ ĉiuj, kiujn mi konas, mi volas, ke decidoj estu farataj ĉi tie, ne ĉiam en Moskvo. La burokratoj en Moskvo ofte ŝajnas nek kompreni la situacion aliloke nek voli aŭskulti plendojn aŭ konsilojn.”

„Ĉu tio nepre necesigus sendependecon?”

„Ne,” diris Marina, dum grupo da studentoj venis renkonte al ili laŭ la trotuaro. „Se politika sendependeco signifus restarigon de naciaj landlimoj, vizoj, doganejoj ĉe la limoj – se estus tiel, mi preferus lozan aŭtonomion sen dispeciĝo de Sovetunio.”

Pli kaj pli da studentoj venis laŭ la trotuaro, kaj dum kelka tempo Marina kaj Travis estis apartigitaj de la muro el korpoj. Travis komprenis neniun vorton de la babilado, kaj do demandis Marina, „Ĉu ili parolas ukraine?”

„Jes, kaj povas esti danĝere paroli ruse en kelkaj lokoj. Oni aŭdas pri ukrainaj huliganoj-studentoj, kiuj draŝis aliajn studentojn nur pro tio, ke ili parolis ruse.”

„Do bone, ke ni parolas esperante,” li komentis.

Ŝi subite aspektis tre serioza. „Trevis, ni ambaŭ agis malsaĝe dum nia

amindumado per poŝto. Mi multe pli kulpis ol vi. Ĉar mi havas partneron. Vi estis viktimo de mia malhonesteco – ne, mi kompatu min mem kaj diru, mia romantikeco. Se vi rekte demandintus, mi skribintus al vi, ke mi estas edzino kaj patrino, sed ... nu, nia korespondado estis tiel bela alternativa mondo al mia griza ĉiutago. Mi devintus esti malpli egoisma. Mi esperas, ke vi povas pardoni min.”

„Marina, mi devas esprimi ĉi tion kun kruela rekteco: se vi povus libere elekti inter mi kaj Paŝa ...”

„Mi probable elektus vin. Pardonu, mi diris tion plumpe. Mi konas Paŝa jam multajn jarojn, kaj mi ŝuldas iom al li. Li estas kelkrilate iom infaneca. Liaj gitarkantoj iam ravis min, sed ili iĝis tro ripetigemaj – grandparte li prikantas siajn aferojn kun virinoj. Kaj lia seksa promiskueco ne tre flatas min. Vi altiras min en freŝa maniero, kvankam ni konas nin nur tre mallongan tempon – aŭ eble, ĝuste tial. Sed mi kredas, ke en longa perspektivo vi kaj mi pli bone harmonius ol mi kaj Paŝa.”

„Kaj Janka?”

„Jes, jen la malfacila elemento. Mi amas la etulon, kiu ege bone rilatas al sia patro. Tre dolorus al li, se la gepatroj apartiĝus.”

„Kaj ĉi ĉio estis en iu fermita fako de via menso, kiam vi skribis al mi amleterojn?”

Ili atingis benkon, kaj Marina volis iom sidadi. „Jes, kaj nur nun mi konscias, kiel stulte mi agis. Mi vere hontas.”

„Kelkfoje mi pripensis inviti vin en mian apartamenton por amori kun vi.”

„Jes, kaj ankaŭ mi pripensis proponi tion. Paŝa kredeble nur ŝultrumus kaj demandus, ĉu ankaŭ li estas invitita. Sed nun mi scias, ke mi ne povas agi tiel promiskue. Mi volus esti via tute – aŭ neniel.”

Estis longa paŭzo. „Vidu, ankaŭ mi sentas tiel pri vi. Mi ne povus dividi vin kun alia viro. Do eble estus plej saĝe, ke ni ne plu renkontiĝu.”

„Vi forgesis pri la Esperanto-grupo. Ni devus ofte renkontiĝi tie.”

„Damne, mi ne volas ĉesi vidi vin, Marina!”

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi specimena eldono. La plena verko estas akirebla de www.retbutiko.be.

Kolofono

Titolo: Amo inter ruinoj

Aŭtoro: Trevor Steele

Serio Stafeto n-ro 39

Kovrilo: Ferriol Macip

ISBN de la papera eldono: 978 9077066 55 3

UDK: 82.3.892

NUR: 300

Leĝa depono de la papera eldono: D/2016/2924/2

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169, 2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2016 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi estas nekompleta ekzemplero de la romano. Ĝi rajtas esti distribuata laŭplaĉe.